

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

4 1982



La korea nacieco de Ĉinio

Fotoj de ZHU XIANMIN

La korea nacieco de Ĉinio kun ĉ. 1.68 milionoj da membroj vivas ĉefe en la provincoj Jilin, Heilongjiang kaj Liaoning. La Yanbian-a Korea Aŭtonoma Subprovinco en Jilin estas loko plej dense loĝata de ĉinaj koreoj. La subprovinco en Changbaimontaro kun favora klimato kaj

abunda riĉfonto estas fama produkto de rizo en norda Ĉinio. Ĝi estas riĉa ankaŭ je ligno, ginsengo, zibela felo, cerva junkorno k.a.

La koreaj vilaĝoj plejparte sin trovas sur ebenaj ĉe montpiedoj. La domoj estas kun kvar-

klina tegmento el pajlo aŭ tegolo. Ĉe la fasado de ĉiu domo estas tri- aŭ kvarklapa ŝovpordo, kiu servas samtempe kiel fenestro. La domo konsistas el dormoĉambro, gasteĉambro, kuirejo kaj kuzenejo. En la domo estas konstruita malalta lito el brikoj aŭ ŝtonplatoj. Enirinte la domon oni demetas siajn ŝuojn kaj sidigas sur la lito. La koreoj emas sin vesti en blanko. La virinoj portas blankan jaketon kaj longan jupon; la viroj veston sur la jaketo kaj pantalonojn kun larĝaj krurumoj, kaj kiam ili volas iri malproksimen, surmetas robon kun troligobandoj ligitaj sur la brusto. Rizo estas ĉefmanĝaĵo de koreoj. Ili ŝatas hundajon, kukon el pistita glua rizo, malvarmajn farunojn, vermiĉelojn, supon kun brunsaŭco kaj peklitajn brasikon kaj rafanon spicitajn per ajlo, kaj siko kaj zingibro pistitaj. Ili amas kanti kaj danci. En festotagoj ili bele ludas kord- kaj blovinstrumentojn. Laŭ la takto de longa tamburo ĝoje dancas la viroj kaj virinoj, la junuloj kaj maljunuloj.

Vilaĝo





Al foirejo



Koreaj virinoj

Ponteto





Panjo preparas tagmanĝon.



Baskulludo ŝatata de koreaj virinoj



Bredejo

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Virino de la ĉina korea nacieco
Foto de ZHU XIANMIN

SUR LA DORSKOVRILO:

Paŝtejo en norda Tibeto (Olepen-
trajo)
de ZHANG FANGZHEN

KOLORAJ SERIOJ:

La korea nacieco de Ĉinio
Printempaj pejzaĝoj en Zhejiang-
provinco
Fotaj pri naturaj belaĵoj faritaj de
E-istoj

(1) Esperantisto-magiisto s-ro
Trixini de Luksemburgio
en prezentado antaŭ la
kongresejo en Regensburg,
FR Germanio, okaze de
la 33-a Fervojista Es-
peranto-Kongreso

(2) Rondtemplo Befreiung-
shalle (Halo de Liberigo)
en Kelheim, FR Germanio

Budhismaj artaĵoj en Wutai-monto
Vojaĝo tra la meza baseno de la
Flava Rivero (1): La antikva
pramejo Fenglingdu

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Nova fizionomio de Shashi
La Dua Kongreso de Pekina Es-
peranto-Asocio
Juna instruistino Hu Menggu

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldo-
naĵoj (GUOJI SHUDIAN)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

La folkloro de Ĉinio	2
Meĉo-floro	6
Meĉo-floro transpasinta landlimon	8
Fervoj-konstruantoj sur altebenajo	11
De Fenglingdu al Lingbao	15
La Esperanto-movado en Ĉinio (3)	19
Rilate la skribon kaj elparolon de ĉinaj loknomoj	23
AMIKECO	24
Pontoj en la akvoriĉa Shaoxing	25
INTER NI:	27
NIA KULTIVEJO: Malsamaj internaciecoj en Esperanto	28
ESP-NOVAĴOJ	30
La progreso de ĉina gimnastiko	32
La 30-a datreveno de la fondiĝo de "Ĉinio en Konstruado"	34
Sanatorio de Taihu-lago	35
La vivo de kamparana familio	38
HUMURAĴO DE LA ANTIKVA ĈINIO	40
KALEJDOSKOPO	41
Leviĝo kaj falo de la Okcidenta Zhou-dinastio	42
Dolĉa akvo vekanta preman zorgon al la mondo	46
KORESPONDI DEZIRAS	48
KURANTAJ AFEROJ	49
Vojaĝo al Norda Shanxi-provinco	50



La folkloro de Ĉinio

de ZHANG WEN

ĈINIO estas lando kun multaj naciecoj. La 56 ĉinaj naciecoj definitive agnoskitaj havas ĉiu sian propran lingvon kaj apartan kulturon. Kvazaŭ riveretoj ili kunfluas kaj formas grandan maron — la nacian kulturon de Ĉinio.

Pro diversaj historiaj kaŭzoj la ekonomio kaj kulturo de iu ajn nacieco ne ĉiam disvolviĝas en ekvilibro kompare kun tiuj de aliaj naciecoj. Inter la 56 naciecoj nur 22 havis skriblingvojn antaŭ la Liberiĝo kaj sekve la plejparto havis nur buŝajn lingvojn. Ilia scio kaj sperto akumulitaj en produktado kaj en

socia vivo estas transdonitaj de generacio al generacio nur pere de la buŝa lingvo, t.e., parte en la formo de rakontoj, kaj parte en la formo de kantoj. Sekve folkloro fariĝis la plej riĉa trezorejo de la kulturo de multaj el la diversaj naciecoj. Fakto estas, ke la folkloro estas grandega fonto, el kiu oni povas abunde ĉerpi por fari studon pri la historio kaj kulturo de iu nacieco.

POPOLRAKONTOJ RIĈKOLORAJ

Se oni volas informiĝi pri la totala kvanto de la ĉinaj popolarakontoj, oni ne ricevas kontentan respondon. La diversaj

pecoj aperigitaj en gazetoj kaj revuoj jam atingis proksimume dekmil, sed sin trovas ankoraŭ multaj aliaj, kiuj ankoraŭ ne estas kolektitaj kaj reordigitaj. Tiuj inkluzivas mitojn, legendojn, fabelojn, fablojn kaj humuraĵojn, ĉiu el kiuj estas karakterizita per propra arta trajto. Estas ankaŭ rakontoj pri saĝuloj ĝis nun trovitaj, kiel “Rakontoj pri Afanti”, “Rakontoj pri Aluan”, “Rakontoj pri Jiajin”, “Rakontoj pri Budang” k.c.

Inter la kolektoj de popolarakontoj jam eldonitaj estas “Elektitaj Popolarakontoj de Ĉinio”. La unua kaj dua volumoj de tiu libro konsistas el

Folkloraj eldonaĵoj



Ĉinaj folkloristoj interŝanĝas spertojn.



pli ol 240 rakontoj de 42 naciecoj. Tiuj rakontoj estas riĉaj je loka koloro kaj naciaj trajtoj. Ili spegulas la vivon kaj batalojn de la diversnaciecaj popolanoj en malsamaj stadioj de sia socio aŭ historio. Ili ankaŭ esprimas iliajn sentojn kaj iliajn dezirojn kaj revojn pri la estonteco.

MARO DE KANTOJ KAJ POEMOJ

Plejparto de la anoj de la ĉinaj nacimalplimulto estas lertaj en kantado kaj dancado. Oni ofte aŭdas ilian kantadon en tiuj lokoj, kie ili loĝas. Laborante, ili kantas pri sia laboro. Vojaĝante, ili kantas pri sia vojaĝo. Ĉe geedziĝo ili kantas pri la gaja nupto. Ĉe edziniĝo ili kantas pri la melankolia disiĝo de la gepatroj. Konstruante domon, ili kantas pri sia feliĉa vivo. Ĉirkuilas ankoraŭ multaj amkantoj, kiujn la gejunuloj reciprokas dum enamigo. Ĝenerale parolante, kantado jam fariĝis grava parto de la socia vivo de la nacimalplimulto.

Ili kutime kantas dum liberaj vesperaj horoj ĉiutage. La gejunuloj ofte aranĝas grupan kantadon. La dungoj kaj mjaŭoj eĉ donas specialajn nomojn al tiuj grupaj amuzoj. Krome, multaj el la naciecoj havas kantofestojn, kiam ili kolektive dediĉas sin al kantado, ekzemple la “marta strato” de la baja nacieco, la “kunveno de floroj” de la nacimalplimulto en nordokcidenta Ĉinio, la “kanto-foiro” de la ĝuanga nacieco k.c. El tiuj la plej fame konataj estas Fiŝ-monto en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj la “kunveno de floroj” de Lotus-monto en Gansu-provinco. Oni donas malsamajn klarigojn pri la deveno de la “kanto-foiro” de la ĝuanga nacieco. La “kanto-



La Unua Jarkunveno de la Instituto pri Ĉina Folkloro

foiro” de Fiŝ-monto estas interligita kun la legendo pri Tria Fratino Liu, bela kantofeino. Laŭ onidiro, antaŭ pli ol mil jaroj, Tria Fratino Liu forkuris el la domo de la bienmastro Mo Huairan por eviti ties subpremadon. Ŝi venis al Liuzhou kaj instruis kantadon al la loĝantoj tie. Mo sekvis ŝiajn paŝosignojn, volante kapti kaj mortigi ŝin, kiu tiam estis kantanta reciproke al alia kantanto. Subite amasiĝis nigraj nuboj, terure fulmis kaj tondris, kaj Tria Fratino Liu indigne ĵetis sin en la lagon ĉe la piedo de Fiŝ-monto. Tuj du oraj karpoj saltis el la akvo. Unu el ili aliformiĝis en grandan ŝtonon kaj dispecigis Mo, dum la alia portis Liu alten al la ĉielo. Rememore al ŝi la popolo okazigas kantokunvenon en la Aŭtunmeza Festo (la 15-a de la oka monato laŭ la luna kalendaro), kaj la kantantoj venas el forraj lokoj kaj kolektiĝas ĉe la

piedo de Fiŝ-monto. Ili grupe aŭ individue kantas unuj al la aliaj ĝis plena kontentiĝo, kaj la kantado eĉ daŭras tra la tuta nokto.

La “kunveno de floroj” de Lotus-monto komenciĝas inter la 2-a kaj la 6-a de la sesa monato ĉiujare laŭ la luna kalendaro. Alia rakonto temas pri la origino de la kunveno. Antaŭ tre longe ĉe la supro de Lotus-monto estis finkonstruita la Templo de la Ĉiela Reĝo, kaj la loĝantoj estis pretaj okazigi solenon por celebri tiun eventon. Alflugis du feinoj malsupren el la ĉielo. Ĉiu el ili tenis lotuson en unu mano kaj koloran ventumilon en la alia. Ili kantis kaj dancis ĉe la montosupro ĉirkaŭita de blankaj nuboj. Ilia bela voĉo surprize ĝojigis la popolamason de diversaj naciecoj. Ili ne plu povis deteni sin de silento kaj ekkantis kune kun la feinoj. La tuta Lotus-monto tuj dronis en

la maro de kantoj. Depost tiam, je la datreveno de tiu okazo, la homoj venas al la monto kaj kantas individue aŭ grupe kaj tiamaniere estiĝas la "kunveno de floroj" de Lotus-monto. Kiel informite, pli ol 60,000 personoj partoprenis tiun kunvenon en 1969.

EPOPEOJ KAJ LONGAJ RAKONT-POEMOJ

Inter la diversaj ĉinaj naciecoj cirkulas ankaŭ epopeoj kaj longaj rakont-poemoj de alta arta kaj historia valoro.

La epopeoj estas ĝenerale dividitaj en du specojn. Unu temas pri la origino de la homaro kaj la deveno de la diversaj aferoj en la vivo, ekzemple, la jam eldonitaj "Meige" de la ĵia nacieco, "La Kreado de la Mondo" de la naŝia nacieco, "La Antikva Bazo de Asi" de la asia nacieco k.c. Tiuj epopeoj traktas ĉefe la originon de la mondo kaj homaro, la pratempan inundegon, la geedziĝon de gefratoj, la estiĝon de diversaj aferoj kaj ĉasadon kaj plugadon. Sekve ĉiuj tiuj

epopeoj havas gravan valoron kiel materialo por la studo de la historio pri la disvolviĝo de la ĉina socio. La alia speco konsistas el epopeoj pri naciaj herooj, ekzemple, la mond-konata "Reĝo Gesar" (de la tibeta nacieco), "Manas" (de la ĥalĥaza nacieco), "Jiangger" (de la mongola nacieco) k.c. Ĉiu el ili estas tre longa verko. Laŭ unuapaŝa esploro estas trovitaj 60 volumoj titolitaj per "Reĝo Gesar", kiuj enhavas pli ol milionon da linioj. "Manas" konsistas el ok volumoj kun centoj da miloj da linioj. Kiel ĉeffiguroj de la epopeoj ĉiam rolas kelkaj herooj, kaj la rakontado temas pri iliaj venkoj super la malicaj, malbonfarantaj diabloj aŭ demonoj kaj iliaj grandiozaj, sukcesaj entreprenoj por feliĉigi la popolon. "Manas" prikantas la elstarajn atingojn fare de pluraj generacioj de la praavoj ĝis la pranepoj de la heroo familia, kaj ĉiu el la ok volumoj temas nur pri unu el la herooj.

Dum la lastaj jaroj la laborantoj sur la kampo de la ĉina fol-

kloro energie klopodis pri la kolektado, reordigo kaj tradukado de tiuj ĉi du epopeoj. La ok volumoj de "Manas" estas jam surbendigitaj kaj estas nun tradukataj kaj reordigataj. Rilate al la epopeo "Reĝo Gesar", du konferencoj estis sinsekve kunvokitaj, kaj oni multe diskutis pri la fosado kaj reordigo de ĝi. 13 volumoj de tiu grandega verko en la tibeta lingvo aperis en Sichuan, Gansu, Qinghai kaj Tibeto. La eldonkvanto superis 300,000 ekzemplerojn, kaj ili ricevis varman akcepton de la tibetanoj. Novaj eltrovoj pri "Jiangger" estis faritaj en la Interna Mongolio kaj Xinjiang, kaj oni multe okupiĝas pri kolektado.

Inter la multaj longaj rakont-poemoj de la diversaj naciecoj tiuj eldonitaj estas "Aŝma", kiu troviĝas en Esperanto, "Zhao-shutun", "Poemo pri Forkuro de Devigita Edziniĝo", "Poemo pri Refoja Renkontiĝo", "Guo Dingxiang", "Rakonto pri Sayram-lago" kaj dekoj da aliaj. Laŭ informo, la taja nacieco de Yun-nan-provinco havas pli ol 500 longajn rakont-poemojn. Krome, ili havas la specialan teorion verkon "Pri Taja Poezio", kiu estis verkita de taja monaĥo antaŭ 360 jaroj kaj estis transdonita en formo de manskribita kajero. La aŭtoro unue pritraktis la kreiĝon de la mondo kaj la estiĝon de la homa buŝ-lingvo kaj poste transiris al la naskiĝo de la kantoj, poemoj kaj skrib-lingvo kaj plue al la diversaj formoj de kantoj kaj poemoj kaj ilia stilo, citante multege da rakontoj. Lia verko estas karakterizita per viva lingvo kaj elokventa stilo kaj pruvas sin majstra kaj valora. Ankaŭ inter la ĝuangoj cirkulas 150 longaj

Folkloristoj kolektas popolrakontojn en kamparo.



rakont-poemoj kaj inter la mongoloj kelkdek.

PLUA FOSADO KAJ STUDADO

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio multaj laboroj estis faritaj en la kolektado, reordigo, eldonado kaj studo de la folkloraj verkoj, kaj ties sukceso estas rimarkinda. En la lastaj jaroj estis starigitaj sur tiu kampo ankaŭ esploraj organizaĵoj kaj institutoj en ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, escepte de Taiwan. En la kadro de la Ĉina Sociologia Akademio estis fondita la Instituto pri Literaturo de Nacimalplimulto kun filio en Yunnan-provinco. Aliflanke la revuoj kaj gazetoj pri folkloro aperas en granda nombro. Krom la nacia revuo "Folkloro" tro-

viĝas ankaŭ dekelkaj aliaj de la sama fako en multaj provincoj kaj urboj.


La ĉinaj literaturaj kaj artaj eldonejoj ankaŭ donas atenton al la aperigo de verkoj pri folkloro. La Ŝanhaja Literatura kaj Arta Eldonejo publikigis la librojn "Eseoj pri Folkloro" kaj "Elektitaj Longaj Poemoj". Ĝi daŭre eldonas kolektojn de elektitaj rakontoj kaj kantoj de diversaj naciecoj, kaj nun aperis jam dekelkaj el ili. Baldaŭ aperos la libro "La Literaturo de Ĉinaj Nacimalplimulto" (kun 1,300,000 ĉinaj ideografiaĵoj) sub la kompilado de la sekcio pri folkloro en la Literatura Instituto sub la Ĉina Sociologia Akademio. Krom tio, represitaj estis la kolektoj de elstaraj folkloraj verkoj, kiuj estis trovitaj

kaj aperigitaj dum la pasintaj 30 jaroj.

La studo pri folkloro akiris konsiderindan progreson en la lastaj jaroj. La Instituto pri Ĉina Folkloro okazigis sian unuan kongreson en majo 1981. En septembro samjare okazis la unua simpozio pri etnografio sub la aŭspicioj de la Instituto pri Folkloro de Liaoning-provinco, kaj en Yunnan-provinco okazis simpozio pri la taja literaturo. Estis aperigitaj en ĉinaj revuoj kaj ĵurnaloj en 1980 ĉirkaŭ 400 artikoloj kaj eseoj pri folkloro.

Krom la supre diritaj formoj de la ĉina folkloro sin trovas ankaŭ infanaj kantoj, lokaj teatraĵoj kaj operoj, proverboj kaj enigmoj. Ĉio ĉi pliriĉigas la vivon de la popolo kaj nutras la literaturon kaj la verkistojn.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. La Guangxi-a Ĝuangnacieca Aŭtonoma Regiono
2. La Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono
3. Turpan
4. Korla
5. Fenglingdu
6. Tongguan
7. Lingbao
8. Xi'an
9. Shaoxing
10. Wuxi
11. Taihu-lago
12. Shanxi-provinco
13. Wutai-monto
14. Yungang
15. Yingxian



MEĈO- FLORO*

(Legendo de mjaŭ-nacio)

ANTAŬ longe estis fraŭlo Dulin. Iutage li estis pluganta sur kruta montodeklivo. La arda suno bakis lin, kaj ŝvito ruliĝadis, gutoj post gutoj, de lia korpo kaj poste falis en ŝtonkavon.

Post nelonge, el la ŝtonkavo elkreskis lilio kun mola tigo, verdaj folioj kaj trumpetforma, jadeblanka floro. Sub la suno ĝi brilis kaj ekkantetis en zefiro.

Sin apogante al la sarkilo Dulin gape rigardas: “Ho! kia mirindaĵo! Lilio kreskas sur ŝtono!”

Ĉiutage Dulin laboras sur la monto, ĉiutage la lilio kantas. Ju pli li pene laboras, des pli ĝi bele kantas.

Iun matenon, veninte al la monto, Dulin trovis la lilion faligita de besto. Li tuj restarigis ĝin kaj diris: “Ho, Lilio! En la monto estas multaj aproj. Mi portu vin hejmen!”

Dulin zorgeme portis la lilion hejmen, plantis ĝin en ŝtonan pistujon kaj metis ĝin sub la fenestron.

Tage li laboras en la kampo kaj vespere plektas bambukorbon hejme en la lumo de la meĉujo. En la domo regas agrabla aromo kaj belsona kanto de la lilio, tial ĉirkaŭ lia buŝo ĉiam sidas rideto.

Estis vespero de la Aŭtunmeza Festo. Ekster la fenestro la plena luno verŝis blankan lumon sur la teron kaj en la ĉambro regis ruĝa lamplumo. Tiam Dulin daŭrigis sian plektadon sub la lampo, subite la meĉo formis grandan ruĝan floron kaj en ĝi ekaperis bela knabino en blanka jupo. Ŝi sonore kantis:

*Lilio disfloras bonodore,
meĉfloro briladas ruĝkoloro.
Junulo laboras en meznokto, —
Knabino jen venas el-meĉfloro.*

La meĉo-floro faris subitan ekstremon, kaj je tio la knabino saltis el la meĉo kaj ridete staris ĉe Dulin.

Tuj poste malaperis la lilio sub la fenestro. Ekde tiam Dulin kaj la knabino fariĝis geedzoj.

Tage ili kune laboras en la kampo sur la monto; kaj nokte en la lumo de la meĉujo la edzo plektas korbon kaj la edzino faras brodadon.

En ĉiu foiro Dulin vendas grenon, bambukorbojn kaj broditajn mantukojn kaj poste aĉetas multajn bezonaĵojn. Ilia vivo estas tiel dolĉa kiel mielo.

Post du jaroj, ili anstataŭigis sian ĥaton per brika domo. Ilia tenejo estas plena de greno kaj la staloj de bovoj kaj ŝafoj. Dulin kontentiĝis. Li ne volis labori plu. Li tuttage sin distris en najbaraj vilaĝoj, fumante pipon kaj tenante birdkaĝon en la mano.

La edzino petis Dulin vendi en la foiro grenon kaj broditajn mantukojn por aĉeti sarkilon, falĉilon kaj silkajn fadenojn, sed li revenis hejmen kun viando kaj vino.

Kiam ŝi admonis al li plugi la kampon sur la monto, li tamen ne iris tien, pretekstante, ke lin doloras la piedoj. Kiam ŝi instigis lin labori

en la lumo de la meĉujo, li diris, ke lin doloras la okuloj.

La edzino diris al li: “Nia vivo ne estas tre bona! Ni ankoraŭ devas penlabori!”

Donante blankajn okulojn al sia edzino, Dulin diris “Hm!” tra la nazo, kaj denove iris al alia vilaĝo kun la pipo en la buŝo kaj la birdkaĝo en la mano.

Iuvespere, la edzino brodis sola en la lumo de la meĉujo, subite la meĉo floris grandan ruĝan floron. Sur la floro paradis bela pavo, kiu kantis:

*Lilio disfloras bonodore,
meĉfloro briladas ruĝkoloro.
Maldiligentiĝis la junulo, —
ĉielen kun mi, knabin', ĉihore.*

La meĉo-floro subite ekbrilis, la pavo desaltis sur la plankon kaj dorsportis la edzinon for tra la fenestro.

Dulin haste leviĝis el la lito kaj kuris al la fenestro. Li povis kapti nur unu plumon de la pavo kaj senfare rigardis la pavon forfluganta kun la edzino en la lunon.

Perdinte la edzinon Dulin fariĝis pli mallaborema. Kiel kutime, li ĉiam fumis la pipon kaj sin amuzis per la birdo.

Dulin vendis la tutan grenon, ĉiujn bovojn, ŝafojn kaj vestojn. Kiam li estis preta vendi la maton, la solan posedajon, li trovis sub ĝi du brodaĵojn. Unu prezentas Dulin kaj lian edzinon ridetante rikoltantajn en orflavaj grenkampoj sur la montodeklivo. La alia montras ilin ambaŭ ridetante laborantaj sub la meĉujo: unu plektas bambukorbon kaj la alia faras brodadon. La tenejo plenas je greno kaj la staloj je bovoj kaj ŝafoj.

Li longe rigardis la brodaĵojn kaj ekmemoris la pasintajn aferojn, subite larmoj fluis el liaj okuloj kaj falis sur la broditan mantukon. Frapante sian kapon per la mano li

diris: “Ho, Dulin, vi mem venigis la malriĉon!”

Li turnis sin, kaptis la pipstangon, rompis kaj ĵetis ĝin en la fornon. Poste li malfermis la kaĝon kaj lasis la birdon forflugi. Li tretis la kaĝon per la piedoj kaj ĵetis ĝin en la fornon.

Ekpreninte la sarkilon li iris al la monto por kulturi sian kampon.

De tiam, Dulin tage laboras en la kampo kaj nokte plektas bambukorbon en la lumo de la meĉujo.

Iutage, Dulin vidis plumon de pavo sub la fenestro kaj pretervole metis ĝin en la ŝtonan pistujon. Rigardante la pistujon, li ekmemoris la lilion kaj la belan edzinon. Ĉe tio liaj larmoj gutadis en la pistujon.

Post momento, malaperis la plumo en la pistujo, sed el ĝi kreskis aroma lilio kantanta.

En la vespero de alia Aŭtunmeza

Festo, brilas la luno ekster la fenestro kaj ruĝe lumas la meĉujo en la ĉambro. Dulin plektas bambukorbon sub la meĉujo. Subite, la meĉo ekfloris grandan ruĝan floron, en kiu kantas la bela knabino en blanka jupo:


*Lilio disfloras bonodore,
meĉfloro briladas ruĝkoloro.
L' junulo laboras tage-nokte, —
saltas la knabino el-meĉfloro.*


Je ekbrilo de la lumo, la knabino saltis de ĝi kaj ridetante staris ĉe Dulin. Malaperis la lilio sub la fenestro.

De tiam, la geedzoj tage laboras en la kampo kaj nokte plektas bambukorbon kaj brodas sub la meĉujo. Ilia vivo estas pli dolĉa ol mielo.

Redaktita de XIAO GANNIU

* Karbigita restaĵo de meĉo, en formo de floro.





Akompanate de Xiao Ganniu (la dua de dekstre), Kitaĝima Tosie kaj ŝiaj infanoj vizitas Lijiang-riveron. Ili kune krias al la ĉirkaŭaj montoj.



YIN YI:

MEĈO-FLORO



LA ĉina popolarakonto “Meĉo-floro” savis la vivon al Kitaĝima Tosie kaj ŝiaj infanoj, kio sensaciis en Japanio. Tiu ĉi rakonto akiris grandan famon kaj estis nomata “pompe disvolviĝanta meĉo-floro transpasinta landlimon”.

“Meĉo-floro” estas popolarakonto de la mjaŭa nacio en Guangxi-provinco de Ĉinio, kolektita kaj ordigita de Xiao Ganniu. Post kiam la japana profesoro Kimiĝima Hisako tradukis ĝin en la japanan lingvon, ĝi estis vaste cirkulanta en Japanio. En 1974, en urbo Itoosi en la gubernio Sijoka Ken, Japanio, juna patrino Kitaĝima Tosie estis forlasita de la edzo. La granda frapo spirita ege malĝojigis ŝin. Ĝuste kiam ŝi estis preta fari sian testamenton kaj sin mortigi, ŝi legis “Meĉo-floron” el “Popolarakontoj de la Mondo”. La rakonto komprenigis al ŝi la veron: Diligenta laborado alportos feliĉon kaj pigreco kaj ĝuemo kondukos al sufero. Ŝi decidis forlasi la

ideon de sinmortigo. De tiam, pere de sia penlaborado, ŝi vivis neŝancelebla kun siaj du infanoj.

Ĵurnaloj raportis tiun veran sed romanecan rakonton estigitan de “Meĉo-floro”, kaj tio altiris atenton de la ĉina kaj japana popoloj. Multe da leteroj venintaj de la hejmloko de “Meĉo-floro” esprimis profundan simpatian al la malfeliĉa Kitaĝima Tosie kaj donis varman subtenon al ŝia nova vivo. La Ĉina Esplora-Asocio de Popola Literaturo afable invitis ŝin kaj ŝiajn infanojn gastigi en Ĉinio.

Kitaĝima Tosie kaj ŝiaj infanoj akceptis la inviton kaj vizitis Ĉinion en oktobro 1981 kune kun la Vizitgrupo “Meĉo-floro”, kiu konsistis el japanaj legantoj kaj havis la urbestron de Simotasi, Isii Moto, kiel sian estron. Ili vizitis Pekinon kaj Guangxi, la hejmlokon de “Meĉo-floro”, kaj estis varme akceptitaj.

Dum la vizitado, Kang Keqing, prezidanto de la Tutlanda

Virina Federacio de Ĉinio kaj vicprezidanto de la Tutlanda Infandefenda Komitato de la Ĉina Popolo, akceptis en la Popola Halo Kitaĝima Tosie kaj ŝiajn infanojn kaj aliajn membrojn de la vizitgrupo. Oni rakontis al Kang Keqing, kiel Kitaĝima elĉerpis el “Meĉo-floro” forton kaj kuraĝon por denove daŭrigi sian vivon. Kang Keqing laŭdis, ke ŝi estas firma virino, kiu superis malfacilojn kaj malfeliĉon per sia volo, kaj ĝojis pro ke la popolarakonto “Meĉo-floro” povas transiri en Japanion trans la maro kaj ludi tiel bonan rolon. Ŝi deziris, ke “Meĉo-floro” fariĝu pli bela amika floro kaj floru inter niaj popoloj de generacio al generacio. Ŝi afable sin klinis por kisi la du infanojn de Kitaĝima kaj gaje kantis kune kun ili. Ŝi karesis la infanojn dirante: “De vi dependas, ke la amikeco inter niaj popoloj herediĝu de generacio al generacio.” Kitaĝima kaj ŝiaj infanoj estis ege emociitaj. La infanoj kantis por avino Kang



TRANSPASINTA LANDLIMON



Kitaĝima Tosie, ŝiaj infanoj kaj geaktoroj de la baleto "Meĉo-floro"

Keqing la kantojn "Bonan sanon al vi", "Hejmloko" kaj aliajn japanajn kantojn por esprimi sian sincerecon.

En Pekino Kitaĝima Tosie, ŝiaj infanoj kaj la vizitgrupo vizitis la belajn vidindaĵojn la Pordegon Tian-anmen, la Imperiestran Palacon, Jingshan-parkon, la Ĉielan Altaron, la Someran Palacon, la Grandan Muron, k. a. Ili vizitis ankaŭ popolan komunumon kaj lernejon, geknaban palacon kaj infanĝardenon. Dum la vizitado ili pli profunde konsciis la nedisigeblecon de la du popoloj en la historio. Ridante, Kitaĝima diris: "Antaŭe mi opiniis, ke tohuo estas origina manĝaĵo de Japanio, sed nun, estante en Ĉinio, mi eksciis, ke ankaŭ ĝi estas veninta el Ĉinio." En la geknaba palaco ŝiaj du infanoj kaj ĉinaj geknaboj kune faldis grupojn el koloraj paperoj, rigardatajn en Japanio kiel feliĉiga birdo. Kiam ili gastis ĉe iu kamparano de la komunumo de la Ĉina-Japana Amikeco, infano de la mastro regalis

ilin per rafanoj ĵus prenitaj el la legomĝardeno. Kaj kiam ili vizitis Malianwa-Lernejon, tie iris sportkunveno. La lernantoj tuj invitis la japanajn geknabojn al vetkuro. "Hej! Hej!" La ĝoj-

krioj kunfandiĝis kun varma aplaŭdo. La ĉinaj kaj japanaj infanoj estis en gaja amikeco.

Kiam la vizitgrupo atingis Guilin, la gvidantoj de rondoj pri la popolaj literaturaĵoj de

Kang Keqing (la unua de dekstre) intervidiĝas kun Kitaĝima Tosie kaj ŝiaj infanoj.





Guangxi kaj la kolektinto de la rakonto "Meĉo-floro", Xiao Ganniu, havanta la aĝon de 74 jaroj, aparte veturis tien el Liuzhou por ilin bonvenigi. Ili tuj amikiĝis je la unua vido, kvazaŭ intimuloj rerenkontiĝus post longtempa disiĝo. Ili kune pririgardis la pejzaĝojn de Guilin famkonatajn en- kaj eksterlande. Sur la grandioza kaj ĉarma Diecai-monto, ili plezure ĝuis la panoramon de Guilin; en mirinda kaj bunta kaverno de Ludiyan ili pririgardis la diversformajn stalaktitojn; sur la pitoreska rivero Lijiang ili remis kaj vidis multajn mirindajn pejzaĝojn. Sur la vojo la maljunulo Xiao Ganniu de tempo al tempo montris al ili famajn montojn kaj ravajn vidindaĵojn de ĉiuj lokoj kaj kun granda intereso rakontis al Kitaĝima Tosie kaj ŝiaj infanoj diversajn legendojn allogajn. Ŝajnis al ili, ke ili mem kvazaŭ estus en paradizo. Dum la vizitado Xiao Ganniu kaj ili kune kantis, ludis aŭ staris vizaĝe al la montoj, laŭte kriante: "Ho!" Tuj aŭdiĝis ĉo de ĉir-

kaŭe kaj malproksime. Ili kunestis kvazaŭ avo, filino kaj nepoj de unu familio. En la plezurboato sur la rivero Lijiang Kitaĝima Tosie faris skribaĵon en la ĉina lingvo "La pejzaĝoj de Guilin superas en la mondo". Ekscitite, la maljunulo Xiao Ganniu tuj proponis, ke ĉiu recitu unu versaĵon pri tiu temo, kaj ankaŭ li mem improvizis versaĵon kaj ĝin surskribis sur paperon por donaci al la gastoj kiel memoraĵon.

En Liuzhou Kitaĝima Tosie kaj ŝiaj infanoj intime interparolis kun la familianoj de la maljunulo Xiao Ganniu, kaj en la nomo de la vizitgrupo donacis al la Popola Galerio de la urbo Liuzhou interalie belan japanan kimonon. La gastigantoj donacis al la gastoj kompletan da mjaŭaj vestoj, zorgeme broditan de mjaŭa junulino en kvar monatoj, juvelojn de la mjaŭa nacio kaj satenan dorsosakon. La ensemblo de la regiono Liuzhou aparte prezentis por la gastoj baletan "Meĉo-floro".

Dum la vizitado, la dekjara filino de Kitaĝima diris en profunda emocio: "Veninte al la hejmlando de 'Meĉo-floro', mi ĉiutage renkontis multajn interesajn aferojn. Tie la homoj estas bonkoraj, kaj mi opinias, ke nur en la lando de tiuj bonkoraj homoj povas aperi tia emocia rakonto. Ni devas esti tiaj homoj, kiel la lilio en la rakonto, bonkoraj kaj firmvolaj homoj kaj fari bonan aferon por la ĉina-japana amikeco." Antaŭ la bedaŭroplena disiĝo, Xiao Ganniu diris al Kitaĝima Tosie: "'Meĉo-floro' prilumis vian koron kaj ankaŭ la mian. Mi deziras, ke ĉiam floru la amikeco laŭdata de niaj popoloj."

Mi estas fervora kolektanto de Esperanto-revuoj. Mankas al mi kelkaj numeroj de malnovaj publikaĵoj (inter ili kelkaj ĉinaj). Kiu posedanto de malnovaj Esp.-publikaĵoj povos helpi min por vendo aŭ intersanĝe? — Ramon MOLERA, Sta. Joaquina, 13-Moia (Barcelona)-Hispanio.



La Vizitgrupo "Meĉo-floro" en ĉina kamparo

Fervoj-konstruantoj sur altebenaĵo

NANJIANG - FERVOJO — granda aorto sur la nord-okcidenta altebenaĵo de Ĉinio malfermiĝis al prov-trafiko. Veturante en trajno, ni, same kiel aliaj pasaĝeroj, sate ĝuis la mirindajn pejzaĝojn ambaŭflanke de la vojo. La admirindaj grandiozaj konstruaĵoj vekis ĉe ni profundan respekton al la fervoj-konstruantoj.

Nanjiang estas loko, kiun tra iris nia antikva “Silka Vojo” al okcidenta Azio, kaj famas tra la lando pro siaj antikva kulturo kaj abundaj produktaĵoj. La fer-

vojo estas konstruita de la fervoja trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ĝi komenciĝas norde de la stacio Turpan sur la Lanzhou-Xinjiang-fervojo kaj finiĝas sude en Korla ĉe la norda rando de Tarim-baseno. Kun totala longeco de 476 kilometroj, ĝi estas la dua trunka linio en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

La ekfunkcio de la fervojo multe faciligis trafikon inter la sudo kaj nordo de Tianshan-montaro kaj havas grandan signifon por akceli varinterŝanĝon

inter la internlando kaj limregiono, prosperigi la ekonomion de la regiono kaj rapidigi la modernigan konstruadon.

Trapasinte Turpan-basenon konatan kiel “flamanta lando”, la trajno grimpis sur Tianshan-montaron laŭ leviĝanta deklivo. Post kvin-hora veturado nia trajno atingis Kuixiadaban, la plej altan lokon en la tuta linio, kiu havas altecon de trimil metroj super la marnivelo. Tie altas montpintoj kaj tiel kapricas la klimato, ke en aŭgusto ofte neĝas kaj ŝtormas. Antaŭ kelkaj

Fervoja stacio en paŝtejo





Tunelado

jaroj, kiam la voj-konstruaj pioniroj alvenis tien, ilin atakis krudaj naturaj fortoj. En unu nokto la starigitaj tendoj estis forblovitaj de uragano. Ili povis fari nenion alian ol fosi kavojn por sin ŝirmi kontraŭ la frosto kaj ventego. Sur la monto ili prenis akvon el degelinta kaj disrompita glacio kaj kolektis bov-fekajon kiel hejtaĵon spite neĝon kaj ventegon. Pri la tiam viva la armeanoj verkis humuran versaĵon:

*Ni transportas akvon per jut-
sako,
uzas bovfekajon por hejtado,
manĝas rizon duonkuiritan,
nokte dormas ni sur lit' el
jado.*

La plej aĝa membro de tiu "unua familio" sur Tianshan-

montaro estis Che Guixuan, pli-ol-kvardek-jara vic-regimentestro. En la unuaj tagoj la maldensa aero vekis ĉe li montajn reakciojn: li sentis sin sufokita, kvazaŭ ŝtono premus sur la bruston, kaj li paŝis malrapide kvazaŭ li havus plumbon sur la piedoj. Sed, ĉiutage antaŭ tagiĝo li vigle gvidis la soldatojn al la konstruejo. Ili boris tunelon en la neniam degelinta glaci-tavolo, en "kristala palaco" kun longaj pendoglacioj kaj kaverno plena de ŝprucantaj fontoj. Ju pli antaŭen etendiĝis la tunelo, des pli maldensiĝis la aero. Ĉiuj laboris en malfacila spirado, kaj la laborefikeco reduktiĝis je 40%. Che Guixuan kalkulis laŭ siaj fingroj kaj ege maltrankviliĝis, ke tiel malrapida konstruado prokrastos la inaŭguron de la linio.

"Ni neniel lasu la trajnon malfruiĝi!" De tiam li restadis tutajn tagojn en la kaverno por observi la ŝanĝiĝojn de la roktavoloj kaj vespere, reveninte en la tendon, konsultis teknikajn librojn. Li trovis en iu libro novan metodon de du laborprocedoj. Li senprokraste rapidis en la tunelon por provi la metodon.

Ĝuste en tiu tempo venis al la konstruejo lia edzino el la riĉa Sichuan-provinco. Arangiĝinte loĝejon por ŝi, li reiris al la tunelo por sia provado. Tiu-tage li laboris en la tunelo ĝis profunda nokto. Blovite de frosta vento, liaj malsekigitaj vestoj glaciigis kaj klakis dum irado. Kiam li revenis al la hejmo, la butonoj estis fiksitaj pro glacio, tiel ke li ne povis demeti la vestojn. Lia edzino disbutonis per varma akvo. Vidinte lin tia, ŝi diris kun kora zorgo kaj maltrankvilo: "Maljuna Che, mi ne malhelpas vin labori tutajn jarojn en montvaloj, tamen vi ankaŭ devas zorgi pri via sano!" Che Guixuan bonhumore ekridis kaj intence turnis la paroltemon, demandante, ĉu ŝi havis bonan vojaĝon. Lia edzino plendis pri la suferiga veturado sur la danĝera montara aŭtovojo. Che Guixuan prenis la fadenon de ŝia parolo kaj diris: "Prave, ĝuste pro tio, ke tro malfacilas la veturado sur la antikva silka vojo, ni konstruas ĉi tie la fervojon, trahakante la montaron." Sekve li konigis, ke Tianshan-montaro ne nur entenas diversajn mineralojn kiel ekzemple karbo, fero, kupro, zinko, asbesto kaj kristaloj, sed ankaŭ havas multajn valorajn arbo-specojn. Krome, li ankaŭ klarigis la grandan signifon de la fervoja konstruado por disvolvi

la ekonomion en la montara regiono. Liaj vortoj varmigis la koron de la edzino.

Frumatene de la sekvanta tago li, kiel antaŭe, faris provadon kaj renovigon en la tunelo. Sukcesis la provo de la nova metodo, kaj ili antaŭdate konstruis la unuan longan koridoron, traborinte Tianshan-montaron.

En la profundo de Tianshan-montaro, krutas kaj zigzagas la rok-valoj, kaj estis tre malfacile manipuli maŝinojn dum la konstruado. Por ke la fervojo pli frue kompletigu, multaj gvidaj kadroj energie studis teknikon

kaj fariĝis kompetentaj organizi kaj direkti mekanikan laboron sur la konstruejo. Interalie, Zou Jingxing, estro de mekanika bataliono, estas elstara ekzemplo.


Zou Jingxing estis unu el la konstruantoj de la fervojo de Chengdu al Chongqing en la komenca periodo post la Liberiĝo. Tiam oni boris tunelon per martelegoj kaj ferstangoj kaj portis teraĵojn per vektoj. La pezega fizika laboro pensigis lin pri mekanikigo. Post kiam li fariĝis mekanikisto de la unua generacio de la trupo, li ĉiam diligente studis kaj scipovis lerte manipuli dekelkajn maŝinojn

kiel buldozo, ŝovelmaŝino, generatoro kaj betonmiksilo.

La fervojo devas trairi lokon, kie supre altas monto kaj malsupre profundas nesondebla lago. Por sekureco oni planis starigi longan ponton por transigi buldozojn. Sed la long-distanca transportado devis konsumi tro multe da homfortoj kaj materialoj. Zou Jingxing faris ĉeloke detalan esploron kaj cerbumadis kiel grimpi sur deklivon je 50 gradoj buldozon, kiu kapablas grimpi nur sur deklivon je 45 gradoj.

Lian proponon subtenis la gvida instanco. Komenciĝis la

Konstruantoj en dezerto



Trajno traveturas tunelon en Tianshan-montaro.





En vagono

peniga laboro. Zou Jingxing atenteme direktis stiriston inverse konduki buldozon supren. La buldozo malrapide rampis supren, kvin metrojn, dek metrojn, dudek metrojn. . . subite, unu moviĝinta ŝtonego rapide rulfalis. Ĝuste je la kriza momento Zou svingis la maldekstran manon, laŭ la signo la stiristo fulme turnis maldekstren la stir-radon kaj tiel la buldozo evitis la falantan ŝtonegon.

La buldozaj raŭpoj tiel glitadis sur la groteskaj ŝtonoj de la kruta deklivo, ke la buldozo apenaŭ deglitis. Ĝuste tiam Zou Jingxing abrupte ekkriis kun mansigno, kaj la stiristo mallevis la klingon, kun klaksono la klingo eniĝis en la grundon kaj la buldozo stabile haltis. Sekve, sub lia atentema direktado la stiristo kondukis la buldozon supren kun mallevo de la klin-

go post ĉiu paŝo, kaj tiamaniere la buldozo finfine surgrimpis la montpinton.

Buldozoj atingis la montpinton unu post alia kaj tuj montriĝis ilia kapablo. Jen ebena relbazo rapide sterniĝis antaŭ la voj-konstruantoj.

Tianshan-montaro estas mistera, kaj neimageblaj malfaciloj aperadis antaŭ la voj-konstruantoj je iu ajn tempo. Tie ofte okazas terfalo, torentas subtera akvo, minacas malofte okazanta ŝlimroka fluo kaj troviĝas glaciaj kanaletoj: unuvorte, nekalkuleblaj malfaciloj hardadis la voj-konstruajn heroojn.

Antaŭ iu spirala tunelo la voj-konstruantoj rakontis al ni pri heroaĵoj de plotonestro Xu Mingtian. Foje okazis granda terfalo. Sub lia komando la aliaj soldatoj sekure retiriĝis, sed li estis vundita. Post kura-

cado li elhospitaliĝis kun atesto de plena ripozo.

Lia varma koro antaŭlonge jam flugis en la tunelon. Reveninte al sia roto, li demetis sian sakon kaj tuj iris al la konstruejo. La tunela enirejo sin trovis sur la krutaĵo alta je pli ol 80 metroj. Por eniri oni devis grimpi la "ĉielan ŝtuparon" kun 263 ŝtupoj. Suririnte nur kelkajn ŝtupojn, li jam sentis netolereblan doloron ĉe la talio, kaj ŝvito fluis de lia frunto guto post guto. Subtenate de kunbatalantoj, li atingis la tunelon. Enirinte, li prenis feran erpilon kaj sin ĵetis en la laboron. Por erpado oni devas klini la talion, kion li ne povis fari pro la vundo ĉe la talio. Li do erpatis kun la brusto rekta kaj la kruroj en formo de forko. Li erpatis tiel rapide kiel la aliaj. Gvidantoj deadmonis lin, sed li tamen persistis labori. Pro doloro kaj laciĝo li havis nek apetiton nek bonan dormon. Por ke li bone ripozu, la kunbatalantoj enŝlosis lin en la ĉambron. Sed li kompatinde petegis ilin tra la fendeto de la pordo: "Mi multe suferos de senfara restado en la ĉambro!" Ĝislarme kortuŝitaj de tiuj vortoj la kunbatalantoj malfermis por li la pordon.

Ĝuste tiuj bravaj soldatoj venkis la malfacilojn unu post alia sur la antikva "Silka Vojo".

La trajno rapidis. La bruado de la radoj kaj alta sonado de la sireno formis imponan simfonion vibrantan super la antikva "Silka Vojo". Jen la himno al la voj-konstruaj herooj!



DE FENGLINGDU AL LINGBAO

de Zheng Zhenjie

LA Flava Rivero, konata kiel la kvina rivero en la mondo, estas la dua rivero de Ĉinio post Jangzi-rivero. Ĝi fontas el la baseno Yueguzonglie de la montaro Bayanhar en Qinghai-provinco, trairas la provincojn Qinghai, Sichuan, Gansu, Shanxi, Shaanxi, Henan kaj Shandong, kaj la Ningxia-an Huj-naciecan Aŭtonoman Regionon kaj la Aŭtonoman Regionon de Interna Mongolio, kaj fine enfluas en Bohai-golfon ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko, kun totala longo de 5,464 kilometroj. Ĝia baseno okupas areon de 752,443 kvadrataj kilometroj, kie troviĝas 20 milionoj da hektaroj da agroj kaj vivas 110 milionoj da loĝantoj.

La baseno de la Flava Rivero estas la lulilo de la ĉina nacio. La fosilia kranio de simihomo, trovita en la gubernio Lantian, Shaanxi-provinco, atestas, ke antaŭ 800 mil jaroj tie vivis simihomoj. La ruinoj de pli ol dumil primitivaj vilaĝoj montras, ke dum la neolitika periodo la prapatroj de la ĉinoj fiksloĝis kaj terkulturadis sur tiu vasta tero. Antaŭ ĉ. 3,500 jaroj Shang-dinastio en la baseno de la Flava Rivero jam fariĝis unu el la tri famaj civilizitaj landoj en la mondo, kiel Egiptio kaj Babilono. Dum la longa historio, nutrate de la Flava Rivero, la brava kaj laborema ĉina popolo kreis brilan kulturon. Sed la Flava Rivero tamen estas unu el la katastrofaj riveroj de la mondo. Laŭ historiaj notoj, dum la


pli ol dumil jaroj antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Flava Rivero breĉiĝis pli ol 1,500 fojojn kaj interalie ŝanĝis sian fluejon 26 fojojn.

La Flava Rivero kaŭzis katastrofon pro somera pluvego kaj sablosedimento ĉe sia malsupra baseno. La akvo de la Flava Rivero estas flava kaj kota. Ĉiu ĝia kubmetro da akvo entenas meznombro 34 kilogramojn da sablo kaj ĉiujare ĝi portas pli ol 1,600 milionojn da tunoj da sablo al sia malsupra baseno, tiel ke la riverujo estas pli alta ol ĝia ambaŭborda tersurfaco, for-

mite surteran riveron. En la malnova Ĉinio, kiam la Flava Rivero breĉiĝis, Henan-provinco en centra Ĉinio suferis la unua kaj la vasta kamparo kaj multaj urboj dronis en inundo. Tial, antaŭ la Liberiĝo la rivero estis rigardata la sufero de Ĉinio.

Kun la paso de la tempo la Flava Rivero finfine eniris en la eraon de la popolo. Kiel ĝi stas hodiaŭ? Kiel iras la konstruado kaj vivas la popolo ambaŭborde de la rivero? Ĉu ĉiuj historiaj restaĵoj estas sendifektaj? Antaŭ nelonge mi faris viziton al lokoj ambaŭborde de la

Riĉa rikolto de pomo en Lingbao



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (1)

rivero en Henan-provinco kaj skribis jenan artikolon pri mia vojaĝo.

FENGLINGDU — ANTIKVA URBO APUD LA FLAVA RIVERO

Iun serenan fruvintran tagon mi ekveturis per aŭtobuso de Ruicheng-gubernio sude de Shanxi-provinco kaj atingis Fenglingdu.

Fenglingdu limtuŝas la gubernion Tongguan de Shaanxi-provinco kaj la gubernion Lingbao en Henan-provinco. Antaŭ longe mi aŭdis, ke se oni staras sur Fenikso-monto, sude de la urbo, oni povas aŭdi la kokerikadon kaj bojadon de Shanxi-, Shaan-

xi- kaj Henan-provincoj. Tial la urbo min forte interesis. Apenaŭ la aŭtobuso atingis la haltejon, mi kun granda ĝojo iris al la centro de la urbo.

Fenglingdu verŝajne estas de antikve trafika centro, kie oni interŝanĝas lokajn specialajn produktaĵojn el ĝiaj najbaraj provincoj, kiel bambukorboj el Sichuan-provinco, plektitaj litoj el palmofibroj el Shaanxi-provinco, fruktoj el Henan-provinco ktp. Kompreneble abundas en la foiro kokoj, fiŝoj, anasoj, ovoj, legomoj kaj similaj.

Verdas tritiko sur la kruta deklivo ĉe la piedo de la Fenikso-monto. Mi per unu spiro

surgrimpis la monton, kaj antaŭ mi prezentiĝis vastega lando. Jen la Flava Rivero, kiu malaperas ĉe la ekstremo de la ĉielo! Ne estis senkaŭze, ke la Tang-dinastia poeto Li Bai (701-762 p.K.) verkis faman versaĵon "De l' ĉielo venas la akvo de l' Flava Rivero". Deirinte la monton, mi longe iradis laŭlonge de la riverbordo kaj aŭskultis la plaŭdadon de la ondoj. Antaŭ la starigo de la Ponto super la Flava Rivero, oni devis transveturi la riveron per boato por iri al Xi'an, Zhengzhou aŭ Taiyuan. Kaj nun ĉiutage trairas la ponton kelkdek pasaĝeraj aŭ varaj vagonaroj. Apenaŭ mi alproksimiĝis al la pontego, kiam vago-

Teknikistoj de Lingbao esploras kreskadon de nova specio de kotono.



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (1)

naro el Shaanxi transiris la Flavan Riveron. La sirensonado sentigis al mi freŝecon.

ĈE LA RUINO DE LA MALNOVA PASEJO TONGGUAN

Forlasinte Fenglingdu, mi atingis la malnovan pasejon Tongguan en Shaanxi-provinco, kiu troviĝas trans la rivero. Ĝi situas pli ol cent kilometrojn okcidente de la fama antikva ĉina urbo Xi'an. Ĉe la pasejo la valbuŝo de la rivero, kie kunfluas la Flava Rivero kaj Weihe-rivero, larĝas ĉ. 850 metrojn. Ĝi estas ankaŭ strategia pasejo por la tri provincoj Shaanxi, Shanxi kaj Henan, kie en la historio ofte okazis militoj. Nemalmultaj dinastioj starigis pasejojn sude de la urbo, utiligante la topografion. Ili estis sume dek du. En la fino de la kvindekaj jaroj de la nuna jarcento, por eskapi la refluantan

akvon el la Akvokonservejo de Sanmenxia proksime de ĝi, la urbo Tongguan prenis la vilaĝon Wu okcidente de Jingou-pasejo, unu el la dek du pasejoj, kiel sian novan sidejon. Hodiaŭ la antikva urbo Tongguan ne plu ekzistas. Restas nur ĝia ruino, norde de kiu estas la Flava Rivero kaj la montaro Zhongtiao, dum aliflanke de la urbo staras la impona Huashan-monto kaj la kruta Xiaoshan-monto. Ankoraŭ videblas la postrestaĵo de la antaŭa pasejo.

Mi restis ĉe la malnova pasejo Tongguan nur mallongan tempon, poste mi veturis al Lingbao en la okcidenta parto de Henan-provinco. En la vilaĝo Wangduo, ĉ. 15 kilometrojn for de la urbo Lingbao, mi vidis alian antikvan pasejon Hanguan ĉe la bordo de la Flava Rivero. Ĝi troviĝas en profunda valo inter la montpintoj. Tie ofte okazis


siatempe militoj. Nuntempe anstataŭe sterniĝas tritikkampoj, jujub-arbaroj kaj pomĝardenoj, kiuj formas belan pejzaĝon.

Kiam mi alproksimiĝis al la guberni-urbo Lingbao, nia aŭtobuso renkontis maloportunecon: sur la pavimita ŝoseo svarmis homfluoj kaj veturiloj, pro kio nia aŭtobuso devis halti. Iu virino en bela vesto diris al mi, ke tie troviĝas foiro, kaj mi eliris por ĝin viziti.

LA FOIRO DE LINGBAO

La foiro estas efektive por interŝanĝi produktaĵojn en la kamparo. Mi informiĝis, ke oni en la gubernio Lingbao okazigas tradician foiron unufoje jare, same kiel en nemalmultaj vilaĝoj kaj urbetoj de Ĉinio. Tiaj foiroj ludas deaktive la rolon por interŝanĝi produktaĵojn inter la kamparo kaj la urboj, pros-

Brutobazaro en foirejo de Lingbao



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (1)

perigi la merkaton kaj vigligi la kulturan vivon en la kamparo.

La skalo de la foiro en Lingbao estis senprecedence granda en la gubernio. Ses ĝis sep dek-miloj da homoj svarmis sur tri stratoj, ambaŭflanke de kiuj estas vendostandoj de vestoj, ĉiutagaj necesajoj, mebloj, fruktoj, legomoj, manĝaĵoj, tabako ktp. Tiu foiro daŭras dek tagojn.

Poste mi venis al ekspoziciejo pri la terkulturaj regionoj de la gubernio. La abundaj ekspoziciaĵoj kaj tabeloj montris, ke surbaze de detala esploro pri la natura riĉfonto de la tuta gubernio, la popolo de Lingbao dividis sian teron kun areo de pli ol 3,000 kvadrataj kilometroj por diversaj celoj. Estas regionoj por porindustriaj plantoj, regionoj en riverbasenoj por grenoj, kotono kaj legomoj, regionoj inter montetoj por kotono, grenoj kaj paŝtado kaj regionoj inter altaj montoj por arbarkulturado, paŝtado kaj specialaj produktaĵoj. La plano utilas al la plenampleksa disvolvo de terkulturado, arbarkulturado kaj paŝtado kaj garantios, ke en la jaro 2000 la enspezo de la gubernio atingos 1,130 milionojn da juanoj, kaj la pokapa enspezo 1,743 juanojn, kiu egalas al mil usonaj dolaroj.

Poste mi vizitis la foiron de terkulturaj kaj tiurilataj produktaĵoj. Jujuboj kaj pomoj, specialaj produktaĵoj de Lingbao, altiris al si multajn homojn. Korboj unuj post aliaj pleniĝis de malmultekostaj fruktoj ne nur en la foiro, sed ankaŭ en la malproksima fervojstacio kaj ĉe

kelke da vojkruciĝoj. Ambaŭflanke de la strato en la grenfoiro staris unu apud alia bambukorboj kaj tolsakoj da rizo, maizo, tritiko kaj faboj. La vendantoj estis kamparanoj, kiuj vendis sian superfluan grenon aŭ tiun produktitan sur la parcelo por sia privata uzo.

La foiro de brutoj kaj tiu de bambuo kaj ligno estis ankoraŭ pli plenaj de homoj. Li Yuliang, respondeculo de la foir-administrakomitato, diris al mi, ke tiutage vendiĝis pli ol 600 brutoj. Vidinte, ke multaj kamparanoj aĉetas bovon, ĉevalon aŭ aliajn brutojn, mi nature ekpensis pri la letero de iu leganto de EPC, kiu diris, ke fabrikado de agrikulturaj maŝinoj velkos post kiam efektiviĝos respondeca sistemo de produktado en la ĉina kamparo. Mi demandis lin pri tio. Li respondis post pripenso: "Ja bonvenaj estas bovo, ĉevalo kaj aliaj brutoj por kamparanoj. Tamen la kamparanoj de Lingbao same kiel tiuj en aliaj lokoj de Ĉinio, havas multan monon, grandan debiton havas ĉi tie ankaŭ malgranda traktoro, dizelo, elektra motoro, elektra pumpilo k.a. Nia agrikulturo devas iri la vojon de meĥanizado."

Plej prosperis la bonakceptita foiro de bambuo kaj aliaj lignoj. Sur terpeco tiel granda kiel piedpilkejo amasiĝis multe da paŭlovnia, salika, popla kaj ulma lignoj. Sidante sur ligno, mi babilis kun pli-ol-50-jara komunumano. Li diris, ke en la pasintaj jaroj ilia brigado plantis tri milionojn da rapide kreskantaj paŭlovnioj (*Paulownia fortunei*), kies ligno estas bona


konstrumaterialo pro sia malpezeco kaj putrorezisteco. Nun la ĉina paŭlovnia ligno vendiĝas en Japanio kaj aliaj landoj. Multaj kamparanoj aĉetis lignon ĉefe por konstrui domojn kaj, ĉar la ŝtataj magazenoj ne povas liveri sufiĉe da ligno al la kamparanoj, ili konkure aĉetas ĝin en la foiro.

En la foiro troviĝas standoj speciale starigitaj de ŝtataj magazenoj. Forvendinte la agrikulturajn kaj tiurilatajn produktaĵojn, komunumanoj aĉetis tie ĉiutagajn necesajojn. Iu vendisto diris, ke en unu tago la standoj vendis ĉiutagajn necesajojn en valoro de 30,000 juanoj.

Tagmeze mi manĝis pasteĉon en kamparana manĝobudo ĉe vojkruciĝo. La budo estis plena de homoj, inter kiuj plejparto estis kamparanoj vizitantaj la foiron. Ili kun ĝojo trinkis, manĝante bovaĵon aŭ arakidojn frititajn.

Forlasinte la foiron, mi venis al la teatro de Lingbao. Antaŭ la bilet-giĉeto kolektiĝis amaso da aĉetantoj. Dum la foira tempo oni tage interŝanĝas materialojn kaj vespere rigardas dramon aŭ filmon, tiel ke tiutempe konkure prezentas proksimaj aŭ malproksimaj teatroj. Tiun vesperon oni prezentis la lokan dramon "Lanca Batalado inter Du Homoj", kiun rigardis multe da kamparanoj. Mi aŭdis, ke iuj kamparanoj venis el loko je pli ol 50 kilometroj for de la teatro; aliaj eĉ luis aŭton por viziti ĝin. Infektite de tia entuziasmo, ankaŭ mi vizitis la teatron. La aktoroj bonege prezentis kaj ofte ricevis aplaŭdojn de la spektantoj.

Nova fizionomio de Shashi



La haveno de Shashi estas unu el la gravaj havenoj ĉe Jangzi-rivero. De tie oni povas ŝipveturi supren ĝis Chongqing kaj malsupren ĝis Ŝanhajo. La urbo estas distribua loko por industria kaj agrikultura produktaĵoj de Jiangnan-ebenaĵo.

La urbo Shashi kun historio de pli ol 2,600 jaroj sin trovas en Hubei-provinco, ĉe la meza parto de Jangzi-rivero. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio okazis al ĝi granda ŝanĝo. Ĝia industria produktovaloro kreskas meznombre je 16.2% ĉiujare. Multaj el ĝiaj produktaĵoj estas famaj tra la lando, kaj 86 specoj da produktaĵoj estas vendataj en 104 landoj kaj regionoj.

Ĝia industria disvolviĝo havigas al multaj urbanoj ŝancon ricevi okupon, kaj nun tie estas apenaŭ troveblaj senlaboruloj. La salajruloj enspezas pli kaj pli multe kaj ilia vivo fariĝas pli kaj pli bona. Krome progresas ankaŭ la urba konstruado, eduka, kultura kaj sanprotekta aferoj.

Belaj littukoj produktitaj de la Shashi-a Littuka Fabriko vendiĝas ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en multaj aliaj landoj.






Parto de la urbo Shashi

Industriaj entreprenoj en Shashi donas grandan atenton al levo de la teknika nivelo de laboristoj. La foto montras instruadon al kursanoj de postlabora teknika lernejo.






Mao Suili (dekstre), estro de la Transistora Fabriko, interkonsiliĝas kun laboristo kiel levi la kvaliton de produktaĵoj.




Shashi enkondukis novajn teknologiojn kaj ekipaĵojn el eksteraj landoj kaj aliaj lokoj de Ĉinio por disvolvi sian tekstilan industrion. La foto montras, ke teknikistoj provas novan ekipaĵon.

Industriaj entreprenoj en Shashi dediĉas grandan atenton al arboplantado por beligi la medion. Jen termoelektrajo de tiu urbo.





Usonaj komercistoj rigardas termosojn produktitajn de Shashi.



La aŭtomataj radiaj driloj, kiuj povas drili truojn en ĉiuj anguloj kaj direktoj, estas projektitaj kaj faritaj de la Unua Ilmaŝina Fabriko de Shashi.

La Esperanto-movado en Ĉinio (3)

LA tria periodo estas de 1949 ĝis 1976, nome de la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝis la fino de la "kultura revolucio", dum kiu la Esperanta movado multe progresis, tamen suferis malagrablaĵojn.

Post la Liberiĝo esperantistoj de Ŝanhajo la unuaj revivigis Esperantan laboron. Ili aranĝis radio-kurson kaj fondis la gazeton «Popola Mondo». Sub la prezido de Hujucz, esperantistoj de Pekino havis multajn kunsidojn por interkonsiliĝi pri establo de landskala Esp-organizaĵo kaj pri eldonado de Esperantaj gazetoj kaj libroj. Post preparado la gazeto «El Popola Ĉinio» naskiĝis en majo 1950. En la sekvanta marto fondiĝis en Pekino la Ĉina Esperanto-Ligo. Ekde tiam la esperantistoj de Ĉinio havas sian solidaran kaj unuecan organizaĵon. Hujucz estis elektita kiel prezidanto de la ligo. Nelonge post sia fondiĝo la ligo transprenis la eldonadon de «Popola Mondo» kaj faris ĝin sia organo.

Kune kun la disvolviĝo de Esperanta aktivado en Pekino kaj Ŝanhajo, multe plivastiĝis la movado en diversaj lokoj de la lando. Sed tiam Sovetunio kaj aliaj orient-eŭropaj landoj malŝatis Esperanton, kio tre malfavoris la distribuadon de «El Popola Ĉinio». Konsidere tion, la Ĉina Esperanto-Ligo decidis ĉesigi sian aktivadon kaj ankaŭ la eldonado de «El Popola Ĉinio» paŭzis.

Ekde 1956 Esperanto reviviĝis en Sovetunio kaj aliaj orient-eŭropaj landoj, tiam ankaŭ la Ĉina Esperanto-Ligo decidis refunkcii. En tiu sama jaro ĉinaj esperantistoj partoprenis en la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago. La ĉina delegacio trovis bonvenon ĉe la alilandaj samideanoj. La lokaj Esperantaj organizaĵoj en la lando aperis en tute nova aspekto. Pekino la unua fondis Esperantan klubon, kiu regule aktivis. La Ĉina Popola Universitato starigis Esperantan kurson. Poste ankaŭ Ŝanhajo, Xi'an, Cheng-

du, Chongqing, Tianjin, Kantono k.a. urboj fondis kursojn de Esperanto. Esperantaj studgrupoj aperis ankaŭ en Nankino, Wuhan, Shenyang, Qiqihar kaj Bengbu.

En 1957 reaperis «El Popola Ĉinio». Dank' al siaj abundaj bildoj kaj interesa enhavo ĝi fariĝis unu el la bonaj pontoj, kiuj helpas interkomprenon kaj akcelas la movadon.

En 1958-1959 Ĉinio eldonis la librojn «Elementa Kurso de Esperanto» de Venlo Fon, «Esperantaj Legajoj» de Tikos

K-do Chen Yi (la unua de maldekstre) vizitis Esperanto-ekspozicion en 1963.





Hujucz (la tria de maldekstre) kaj partoprenantoj de la Ĉina Esperanta Laborkunveno en 1979

kaj «Nova Vortaro Esperanta-Ĉina» de la Ĉina Esperanto-Ligo.

En tiu periodo ĈEL sendis delegitojn al la kongresoj de Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario kaj al la 44-a Universala Kongreso en Varsovio. Cetere ĉinaj esperantistoj akceptis pli ol 20 samideanojn el pli ol 10 landoj.

En la sesdekaj jaroj la ĉina Esperanto-movado havis novan evoluon. La Ĉina Fremdlingva Eldonejo eldonis multajn Esperantajn broŝurojn. En septembro 1963 oni aranĝis en Pekino Esperanto-ekspozicion, kiun rigardis vicĉefministro Chen Yi kaj aliaj altranguloj. Preskaŭ samtempe kun tio okazis

Esperanta prelegado en Shashi



la Unua Tutlanda Esperanta Laborkunveno. En la kunveno Chen Yi faris longan entuziasman paroladon, kio multe inspiris la ĉinajn esperantistojn. En tiu jaro la Eduka Ministerio ordonis fondi Esperantan kurson por instruistoj. La kurson partoprenis junaj instruistoj el 11 superaj lernejoj de la lando. Unu jaron poste iuj el tiuj lernejoj ekhavis unu post alia Esperantan kurson.

En la aŭtuno de 1964 la Eduka Ministerio fondis Esperantan kurson en la Disaŭdiga Instituto de Pekino, en kiu lernis 20 studentoj el kvin superaj lernejoj. Poste ili fariĝis profesiaj laborantoj por nia lingvo. En la fino de tiu jaro Radio Pekino lanĉis siajn Esperantajn elsendojn, kiuj estas tre bonvenaj al la monda esperantista publiko.

En 1965 Ĉinio esperantigis la dokumentan filmon «Brila Festotago». Oni faris tion por la 50-a UK en Tokio, sed pro ia kaŭzo la ĉina delegacio ne sukcesis atingi la kongreslandon kaj la kongresanoj ne povis rigardi la filmon. En 1967 «El Popola Ĉinio» fariĝis monata gazeto (antaŭ 1967 ĝi aperis en ĉiu dua monato).

Sed en la dekjara tumulto de post la komenco de la “kultura revolucio”, la ultramaldekstra pensfluo detruis la socialisman kulturlaboron. Ankaŭ la Ĉina Esperanto-movado vegetis. Dum tiu tumulto nur la Esperanta disaŭdigo kaj la eldonado de «El Popola Ĉinio» kaj Esperantaj libroj feliĉe restis seninterrompaj, sed preskaŭ tute silentis la Esperanta movado en la tuta lando. Sed en la internacia sfero ĈEL sendis en 1973 sian delegacion al la 60-a Kongreso de Japanaj Esperantis-

toj kaj en 1975 sendis vizitgrupon al Vjetnamio. Cetere ĉinaj esperantistoj kontaktiĝis kun alilandaj samideanoj vizitantaj Ĉinion. La ĉina Esperanto-movado revigliĝis nur post la falo de la kvarpersona bando.

En la tria periodo Ĉinio abunde eldonis esperantaĵojn. Nekompleta statistiko diras, ke en la periodo de la komenco de la kvindekaj jaroj ĝis la mezo de la sepdekaj jaroj, oni eldonis pli ol 260 Esperantajn librojn inkluzive de la kvar volumoj de «Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong» kaj pli ol 60 liaj broŝuroj, librojn pri la politiko, historio kaj geografio de Ĉinio, literaturajn verkojn, bildlibrojn kaj infanlibrojn. Inter la literaturaj verkoj troviĝas «Ĉina Antologio», «Por Nova Afero, Nova Maniero», «Noveloj de Lusin», «Rakontoj pri Fantom-spitanoj», «Aŝma» k.a. Tiuj libroj distribuiĝis en dekoj da landoj kaj multe helpis ties esperantistojn koni Ĉinion.

La kvara periodo komenciĝis de 1976. Ĉinio eniris en novan

historian etapon kaj denove prosperiĝis diversaj socialismaj aferoj, inkluzive la kulturala laboron. La ĉina Esperanto-movado troviĝis en senprecedence favora situacio.

En 1978 esperantistaj grupoj de Suzhou, Wuhan kaj Chongqing la unuaj rekomencis siajn agadojn. Esperantistoj de diversaj lokoj de la lando denove ekhavis vastan kontakton.

En aŭgusto 1979 okazis en Pekino la Dua Esperanta Laborkunveno. Ĝi konfirmis la kontribuojn de la ĉinaj esperantistoj, kritikis la ultramaldekstran linion en la Esperanta laboro kaj difinis la orientiĝon kaj taskojn de esperantistoj en la nova historia etapo. La kunveno multe inspiris la ĉinajn esperantistojn. Post la kunveno, sub la helpo de diversnivelaĵoj registaroj kaj koncernaj departementoj, impetis la Esperanto-agadojn en diversaj lokoj. Antaŭ la fino de 1981, la provincoj Hubei, Hunan, Anhui, Jilin kaj Yunnan, la aŭtonoma regiono Interna Mongolio kaj la urboj Pekino,

Chengdu, Chongqing, Wuhan, Bengbu, Xi'an, Huainan, Huhhot, Huangshi, Siping kaj Liuzhi fondis Esperanto-societojn aŭ Esperanto-institutojn. La provincoj Shanxi, Fujian, Jiangsu, Hebei, Jiangxi, Liaoning kaj la urboj Ŝanhajo, Tianjin, Kanton, Nankino, Hangzhou, Ŝenyang, Nanning k.a. sin preparas por starigi Esperanto-societojn. Diverslokaj esperantistaj organizaĵoj fervore propagandas Esperanton. Ili fondis Esperantajn kursojn kaj okazigis simpoziojn kaj ekspoziciojn. Krome ili ankaŭ korespondas kun alilandaj samideanoj.

En la lastaj tri jaroj, pli ol 40 urboj kaj pli ol 20 gubernioj de nia lando starigis Esperantajn kursojn. Nun laboras du korespondaj Esperanto-lernejoj Xinhua kaj Huainan. Nun lernas Esperanton pli ol 60,000 ĉinoj, kiel laboristoj, instruistoj, oficistoj, sciencistoj kaj lernejanoj.

Ĝojiga estas la progreso de Esperanto sur la eduka kampo. Nun la Orient-Ĉinia Normala



Kune kantas ĉinaj kaj japanaj esp-istinoj.

Universitato, la Centra-Ĉinia Normala Instituto, la Universitato de Nankino, la Universitato de Sichuan kaj la Tria Normala Lernejo de Chongqing prenis Esperanton kiel devigan kurson de fremda lingvo. La Pekina Lingvo-Instituto, la Financa kaj Ekonomika Instituto de Sichuan, Hangzhou-universitato, Shandong-universitato, la Tekstila Instituto de Ŝanhajo, la Agronomia Instituto kaj la Sporta Instituto en Shenyang, la Normala Instituto de Hunan k.a. fondis Esperanto-kursojn. En novembro 1981 la Eduka Ministerio sankciis la fondon de porinstruista Esperanto-kurso en la Pekina Fremdlingva Instituto. En la kurso lernas 23 junaj geinstruistoj el 16 superaj lernejoj. Cetere esperantistoj de Hunan kaj Ŝanhajo instruas Esperanton al mez- kaj elementlernejoj.

En oktobro 1981 debutis la organo de ĈEL «La Mondo». Ĝi certe akcelos la ĉinan Esperanto-movadon. En la pasintaj du jaroj ĈEL eldonis Esperantan lernolibron kaj kelkajn librojn kun klarigoj. Ankaŭ lokaj Esperanto-organizaĵoj eldonis Esperantan instrumaterialon kaj vortarojn. La redakcio de «El Popola Ĉinio» esperantigis la librojn «Aŭtuno en la Printempo», «El Ĉina Poezio», «Matenaj Floroj Kolektitaj

en Vespero» kaj «Kanto de Juneco».

La fondiĝo de «Amikoj de Esperanto» estas mejloŝtono en la disvolviĝo de la ĉina Esperantomovado. La organizaĵon iniciatis ĉinaj eminentuloj Chu Tunan, Hujucz, Bakin k.a., al kio varme respondis multaj aliaj ĉinaj famuloj. «Amikoj de Esperanto» influos en konsiderinda grado la Esperantomovadon de Ĉinio kaj tiun de la mondo.

En la komenco de la kuranta jaro fondiĝis en Pekino la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi eldonos librojn pri Ĉinio kaj legaĵojn konvenajn por ĉinaj esperantistoj.

La enlanda Esperantomovado vekis atenton de la ĉina ĵurnalistaro. En la pasintaj du jaroj ĉinaj gazetoj, ĵurnaloj, radiostacioj kaj televidaj stacioj ofte raportis pri Esperanta aktivado. «Scienca kaj Teknika Revuo de Shanxi», «Lingva Ĝardeno» de Guangxi kaj «Ĝermoj de Scienco kaj Tekniko» de Guizhou dediĉis spacon por Esperanto-kurso. La televida stacio de la urbo Huainan, Anhui-provinco, kaj la radiostacio de la urbo Taiyuan, Shanxi-provinco, okazigis Esperantajn radiokursojn.

La gazeto «El Popola Ĉinio» havas siajn legantojn en pli ol

60 landoj. En la pasintaj du jaroj, la redaktoroj faris pli da klopodoj por pliplaĉigi la eldonaĵojn kaj trovis pli kaj pli da legantoj. La abonantoj ofte skribas al la redakcio por doni konsilojn kaj laŭdojn. La Esperanta radio-disaŭdigo de Ĉinio servas al Eŭropo, Latin-Ameriko kaj nordorienta kaj sudorienta Azio. Dank' al sia diligenta laboro la Esperanto-sekcio de Radio Pekino akiris multajn amikojn.


Ekde 1978 Ĉinio ĉiujare sendis delegacion al Universala Kongreso. En 1980 la Ĉina Esperantista Delegacio kun Bakin kiel sia estro ĉeestis la 65-an UK en Stokholmo. En tiu jaro Ĉinio sendis delegacion ankaŭ al la Dua Pacifika Kongreso de Esperanto.

La Ĉina Esperanto-Ligo fariĝis pli proksima al UEA. En aŭgusto 1980 UEA akceptis Ĉinion kiel membrolandon. En 1981 Bakin estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. En februaro 1981 ĝenerala sekretario de UEA d-ino Flóra Szabó-Felső gastis en Ĉinio laŭ la invito de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ŝi amike intertraktis kun gvidantoj de ĈEL pri ebla kunlaboro.

Ekde 1978 esperantistoj de Britio, Francio, Japanio, Usono, Jugoslavio, Finnlando, Svislando, Svedio, okcidenta Germanio, Aŭstralio k.a. vizitis Ĉinion. Vojaĝante en Ĉinio, ili renkontiĝis kun esperantistoj de diversaj lokoj, kio akcelos reciprokadon de informoj pri kulturo kaj nia movado kaj plifirmigos la amikecon.

El ĉio supre dirita oni vidas, ke la latentata forto de la ĉina Esperantomovado estas granda kaj la perspektivo bela.

Esperanta ekspozicio okazinta dum la inaŭguro de la Chongqing-a Esp-Asocio



Rilate la skribon kaj elparolon de ĉinaj loknomoj

de G. SUTTON

LA ĉina lingvo jam de longe havas unuecan kaj oficialan sistemon por transskriboj al latinaj literoj (pinyin), kiun EPĈ kompreneble uzas. Skribante en Esperanto, oni kompreneble uzas la akceptitajn adaptojn de nomoj de lokoj internacie konataj (ekz. Pekino, Ŝanhajo, Parizo ktp), tutsame kiel oni faras en ĉiu alia lingvo (kp. London, Llundain, Londres, Londen, Lontoo, Londono, . . .). Por aliaj lokoj malvaste konataj oni, ankaŭ tutsame kiel en ĉiuj aliaj lingvoj, uzas la originan formon. Kelkaj emas plendi, ke ili ne povas elparoli ĉi tiujn transliteritajn formojn en EPĈ. Unue, estas rimarkinde, ke laŭ la sola praktika kaj tutmonde akceptita kutimo oni ne povas doni proksimumajn prononcojn de fremdlingvaj loknomoj (kp. kun via loka ĵurnalo, en kiu vi trovos nomojn kiel Philadelphia kaj Schaapsveld, kies ĝustan prononcon la plimulto de homoj ne scias). Due, ne eblas reprezenti la sonojn de unu lingvo per la literoj de alia (kiel cetere videblas malsupre). Ankaŭ utiligo de la Internacia Fonetika Alfabeto ne helpus tiujn, kiuj ne scias ĝin.

Por kontentigi tiujn, kiuj interesiĝas, ni jene klarigas kiel elparoli tiujn ĉefajn sonojn de la ĉina lingvo, kiuj multe diferencas de la Esperanta prononco.

Inicialoj (komence de silaboj):
c = c kun forta aspiracio; z = c

neaspiracia; h = ĥ; w = u. Palataloj: j = ĝ senvoĉa; q = ĉ forte aspiracia kun la langopinto ĉe la supra dentokarno; x = inters kaj ŝ kun la langopinto ĉe la supra dentokarno. Retrofleksaj sonoj: zh = ĉ neaspiracia kun la langopinto malantaŭen tirita

al la palato; ch = kiel "zh" sed aspiracia; sh = kiel ŝ kun la langopinto malantaŭen tirita al la palato (norvega-sveda "-rs"); r = kiel ĵ kun la langopinto kiel por la aliaj retrofleksaj sonoj.

Kelkaj finaloj: -ao = -aŭ; -i = plej ofte kiel en Esperanto, sed post retrofleksa inicialo ĝi ĉiam iĝas langopinta palatalo; -ian = -jan; -ü = kiel en la germana, franca "lune", kvazaŭ lipronda i; -u = plej ofte kiel en Esperanto, sed post j, q, x aŭ y ĉiam kiel ü; -ui = ŭej; -un = -un.

ABONTARIFO DE "E.P.Ĉ."

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	5.70	9.60	14.40
Aŭstrio	Sch	81.60	136.00	204.00
Belgio	BF	180.00	300.00	450.00
FR Germanio	DM	10.80	18.00	27.00
Britio	£	3.00	5.00	7.50
Finnlando	FMK	24.00	40.00	60.00
Francio	FF	26.40	44.00	66.00
Italio	Lit	5280	8800	13200
Japanio	Yen	1400	2800	4000
Jugoslavio	Din.	150	250	370
Nederlando	Gld.	12.60	21.00	31.50
Nov-Zelando	NZ\$	6.70	11.20	16.80
Svisio	SF	10.50	17.60	26.40
Usono	US\$	6.00	10.00	15.00
Kanado	Can\$	7.20	12.00	18.00


* * *

Por aliaj landoj en Eŭropo:

£	3.00	5.00	7.50
US\$	6.00	10.00	15.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

£	2.20	3.60	5.40
US\$	4.30	7.20	10.80



LA AKROBATA TRUPO DE WUHAN EN KANADO

La Akrobata Trupo de Wuhan, Ĉinio, komencis sian viziton al Kanado en januaro 1982 kaj faris ĝis la 15-a de marto turneon en grandaj urboj de Kanado kiel Ota-vo, Montrealo kaj Toronto.

Vespere de la 10-a de januaro la kanada ĉefministro Pierre Trudeau kun siaj tri infanoj rigardis la prezentadon de la trupo. Post la rigardo li intervidiĝis kun ĉiuj ĝiaj membroj.

LA RAKONTA FILMO "NE-FINITA VEJĈI-LUDO" KUNE FILMATA DE ĈINIO KAJ JAPANIO

La 13-an de januaro komenciĝis en Japanio la filmado de la rakonta kolorfilmo "Nefinita Vejĉi-ludo". La fama ĉina filmaktoro Sun Dao-lin, kiu rolas en la filmo, diris, ke kvankam li ludis en multaj filmoj, tamen li unuafoje filmludas kunlaborante kun eksterlandaj aktoroj. Li ludas en la filmo la rolon de ĉina vejĉi-ludisto, anstataŭ la fama artisto Zhao Dan, kiu mortis en la pasinta jaro.

LA USONA KORDINSTRUMENTA KVARTETO "AUDUBON" EN ĈINIO

La 8-an de januaro la Usona Kordinstrumenta Kvarteto "Audubon" donis koncerton en Pekino, en kiu ĝi prezentis verkon de Haydn, Mendelssohn, Beethoven, Brahms kaj Dvorak kaj ĉinajn muzikojn, ricevante aplaŭdadon de

ĉinaj amatoroj. La kvar ludistoj estis violonistoj Dennis Cleveland kaj Sharon Smith, aldisto Doris Lederer kaj violonĉelisto Thomas Shaw.

SRILANKAA PIANISTINO MALINEE PERIS EN PEKINO

En januaro la fama srilankaa pianistino Malinee Peris donis recitalon en Pekino. Ŝi ludis famajn eŭropajn klasikajn muzikojn de Haydn, Chopin, Debussy kaj Beethoven kaj muzikojn de la ĉina komponisto He Luting, pro kio ŝi ricevis laŭdojn de la ĉinaj aŭskultantoj.

ĈEFEPISKOPO DE CANTERBURY EN NANKINO

Laŭ la invito de episkopo Ding Guangxun, estro de la Nankina Unia Teologia Seminario kaj prezidanto de la Tri-mema Patriota Komitato de la Ĉina Protestanta Asocio, Robert Runcie, ĉefepiskopo de Canterbury, Britio, kaj lia grupo faris privatan viziton en Nankino de la 8-a ĝis la 10-a de januaro.

La 9-an de januaro la instruistoj kaj lernantoj de la seminario okazigis kunvenon por bonvenigi ilin. Invitite, ĉefepiskopo Robert Runcie faris paroladon, en kiu li diris, ke la protestantismo de malsamaj landoj havas malsamajn kulturajn fonojn kaj tiel posedas siajn proprajn trajtojn. Ankaŭ tiel estas por la ĉina protestantismo. Estas respektataj la kutimoj kaj kredoj de diverslandaj specoj de protestantismo.

EKSPozICIO DE ĈINAJ TREZOROJ EN BELGIO

Inter la 21-a de januaro kaj la 18-a de aprilo okazis la Ekspozicio de Ĉinaj Trezoroj en la Brusela Palaco de Arto. Ĝi estis la unua granda ekspozicio de Ĉinio en okcidenta Eŭropo, kun 133 antikvaj

ĉinaj artaj kaj metiaj kreaĵoj faritaj inter 500 a.K. kaj 907 p.K.

RUMANIO OKAZIGIS EKSPozICION DE ĈINAJ KSILOGRAFAĴOJ

En januaro la Rumana Asocio por Kultura Kontakto kun Fremdaj Landoj kaj la Rumana-Ĉina Asocio por Amikeco okazigis en Bukareŝto ekspozicion de ĉinaj ksilografajoj. Estis montritaj pli ol 60 verkoj de ĉinaj junuloj kaj mezaĝuloj, kiuj ricevis laŭdojn de la rigardantoj.


EKSPozICIO DE ĈINAJ PENTRAĴOJ KAJ SKULPTAĴOJ EN MALIO

La Delegacio de Ĉinaj Belartistoj gvidata de prof. Wu Guanzhong okazigis en Malio ekspozicion de ĉinaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj de la 21-a ĝis la 24-a de januaro. La ekspoziciaĵoj estis olepentaĵoj, skizoj kaj skulptaĵoj, kiuj spegulis la kulturon kaj vivon de la ĉina popolo kaj naturajn riĉfontojn de Ĉinio.

"HISTORIO DE ĈINA FILOZOFIO" ELDonITA EN GREKIO

La duvoluma kaj 1.050-paĝa libro "Historio de la Ĉina Filozofio", kun 15 sekcioj kaj 65 ĉapitroj, verkita de la fama greka erudiciulo Dimitris Velessaropoulos estis eldonita en januaro. Ĝi konigas al grekaj legantoj la originon kaj evoluon de la ĉina filozofio de la 11-a jarcento a.K. ĝis la nuntempo, kaj ankaŭ la pensulojn kaj filozofojn kaj iliajn verkojn en diversaj dinastioj de Ĉinio.





Pontoj en la akvoriĉa Shaoxing

de Mei Kaj



SHAOXING, la hejmloko de la granda ĉina verkisto Lusin, troviĝas en reto de riveroj en Zhejiang-provinco, tial ĝi abundas je pontoj, tiel ke oni devas transpasi plurajn dum vojirado. Statistikoj montras, ke en la gubernia urbo Shaoxing ekzistas pli ol 300 diversaj pontoj, kaj en la tuta gubernio pli ol 3,000 pontoj.

Ĉar la gubernia urbo Shaoxing estas ĉe la piedo de Guijimonto, kiu produktas bluan ŝtonon, plejparto de la tieaj pontoj estas farita el tia materialo. Konforme al la malsamaj topografioj, la pontoj alprenas diversajn formojn: iuj estas imponaj, aliaj delikataj kaj malgrandaj, triaj ondaj, kvaraj similaj al rubando . . . Kune kun la pitoreska naturo de suda Ĉinio, ili formas ĉarmajn pejzaĝojn.

Multaj antikvaj ŝtonpontoj de Shaoxing rilatas al cirkulantaj anekdotoj. Ekzemple arkoponto en la urbo Shaoxing nomata Ponto por Surskribado de Ventumiloj diskoniĝis per jena interesa anekdoto: En la 4-a jarcento, la fama kaligrafo Wang Xizhi loĝis en Shaoxing. Foje li trapasis tiun ponton, irante al sia amiko, kaj vidis maljunulon vendantan bambuajn ventumilojn sur la ponto. Revenante de sia vizitado en vespero, Wang rimarkis, ke la maljunulo ankoraŭ restas tie, proponante siajn vendadojn. Li pensis, ke ŝi devas daŭrigi sian klopodadon en tiel malfrua horo eble pro tio, ke mankas al ŝi mono por aĉeti rizon pro nevendableco de ventumiloj. Li faris do surskribojn sur ŝiaj ventumiloj per sia peniko. La maljunulo grumblis, ke li makulis ŝiajn ventumilojn, sed tiam Wang diris al ŝi: "Onklino, krii, ke la surskriboj estas faritaj de Wang Xizhi kaj ĉiu peco kostas 100 kuprajn monerojn!" La malju-

nulino faris laŭ liaj vortoj kaj oni vere aĉetis la ventumilojn konkure. Pro tio oni de tiam nomas la ponton Ponto por Surskribado de Ventumiloj.


La Aroma Ponto troviĝas flanke de Meiyuan-strateto. Oni diras, ke la granda poeto Lu You (1125-1210) plantis en ĝardeno centojn da umearboj, kiufloris en frosta sezono, parfumante la aeron. Trapasante la ponton en tia sezono, irantoj ofte haltis por ĝui la aromon agrablan, kaj pro tio oni ekuzis la nomon Aroma Ponto.

Ke-ponto interligiĝas kun la fama ĉina muzikisto Cai Yong de la 2-a jarcento. La justama Cai skribis al la imperiestro leteron, en kiu li kritikis la kortegon, kaj pro tio li estis miskulpigita kaj kondamnita al ekzilo, kaj poste kiam li estis amnestiita, lin persekutis eŭnukoj, tial li fuĝis al Shaoxing. Loĝante ĉe Ke-ponto en la urbeto, Cai faris bambuan fluton kaj ofte ludis

belan muzikon per ĝi en tiu loko.

En la 16-a jarcento japanoj ofte invadis la marbordan regionon de sudorienta Ĉinio. Iutage, kiam kamparano Yao Changzi estis laboranta sur kampo, subite alvenis japanaj invadantoj. Yao ekbatalis kontraŭ ili per sia forkego, sed li estis fine kaptita. Tiuvespere la invadantoj devigis lin servi kiel vojevadisto. Survoje Yao renkontis samlokanon kaj kaŝe sciigis al li sian planon ekstermi la malamikojn sur la Eksterma Altaro ĉirkaŭita de akvo. Tuj kiam Yao kondukis la malamikojn sur la altaron transe de ŝtona ponto, kamparanoj detruis la du ŝtonajn pontojn interligantajn la altaron kun la bordoj kaj ekstermis la malamikojn, sed bedaŭrinde Yao estis mortigita de la japanoj. Por memori pri la heroo Yao, la popolo rekonstruis la du pontojn kaj ilin nomis Triumfa Ponto kaj Paca Ponto.

Ankaŭ Taiping-ponto kaj Bazi-ponto estas famaj en Shaoxing. La unua troviĝas 15 kilometrojn okcidente de la urbo.




Liuhan-ponto


Ĝi estas longa ponto impona kun naŭ arkaĵoj super antikva kanalo. La unua arkaĵo de tiu ŝtona ponto alte sin levas, kvazaŭ draka kapo rigardanta al la ĉielo, kaj la ceteraj ok arkaĵoj malleviĝas iom post iom al la akvosurfaco. Irante sur la ponto, oni sentas sin kvazaŭ rajdanta sur drako fluganta en la ĉielo. Ne estas mirinde, ke la popolo rigardas la ponton kiel reprezentanton de la belaĵoj de la akvo-riĉa loko.

Bazi-ponto troviĝas sudoriente de la urbo. Ĝi estas unu el la plej antikvaj pontoj de Shaoxing. La supre menciitaj antikvaj pontoj estis rekonstruitaj en diversaj epokoj, dum tiu ĉi konstruaĵo farita antaŭ pli ol 700 jaroj restas senŝanĝa. Ĉar la ponto estas en formo de inversigita v, ĝi ricevis la nomon Bazi, kiu signifas "ok" en la ĉina lingvo. Tia ponto estas jam tre rara en nia lando.

Taiping-ponto



Ke-ponto







Loĝdomoj de kamparanoj de Tonglu-gubernio

Printempaj pejzaĝoj en Zhejiang-provinco

Flosoj sur Tianmu-rivero








Bela spegula bildo en akvo

Malantaŭ domo



Fiŝlago

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAJOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

de LEOPOLD POTEK (Aŭstrio)

Esperantisto-magistro s-ro Trixini de Luksemburgio en prezentado antaŭ la kongresejo en Regensburg, FR Germanio, okaze de la 33-a Fervojistaj Esperanto-Kongreso



Rondtemplo Befreiungshalle (Halo de Liberiĝo) en Kelheim, FR Germanio



Mi atendas vian revuon kiel gejunuloj atendas amleteron. Ĝian enhavon mi "manĝas" kiel la mal-satulo manĝas sian manĝon.

La bildoj koloraj kaj nigra-blankaj venas nokte en miajn sonĝojn, kaj tio signifas, ke mi devas viziti Ĉinion. Mi esperas, ke mi sukcesos plenumi mian deziron.

Ĝenerale mi ŝatas artikolojn kiuj rilatas sole al Ĉinio. Tiuj estas artikoloj pri viaj moroj kaj kutimoj, pri la nuna vivmaniero de la laboruloj kaj oficistoj, la vivmaniero de gemaljunuloj, de viaj nacimalplimulto, pri geografio, historio.

Kvankam mi ne estas doktorino, tamen mi legas kun granda intereso artikolojn pri medicino (ekz. la Keŝan-malsano, akupunktura anestezo ktp.).

de **DESPINA ANTONIADOU**
(Grekio)

Antaŭ pluraj jaroj mi sendis al vi miajn opiniojn pri tiama enhavo de via gazeto. En tiu tempo mi ne estis tute kontenta pri la enhavo. Sed poste vi ŝanĝis ĝin per la nuna programo kaj mi do estas tute kontenta. Mi ne trovis alian gazeton pli bonan ol EPĈ en formato, kvalito kaj ankaŭ varieco de bildoj. En nia socio ni ĉiam uzas vian gazeton propagandcele por nia lingvo kaj movado. Do ni turnas nin precipe al neesperantistoj. Via gazeto estas tiel okulfrapa, ke ĝi haltigas la vizitantojn por trafolumi kaj tio ebligas al ni informi buŝe.

Eble trovo de tombejoj de iama epoko kaj esplorado de ili estas por mi plej interesa. Do mi esperas, ke vi daŭrigos laŭ la nuna programo enhavo vian gazeton EPĈ.

de **EVERT RAUSEK**
(Svedio)

Ni ambaŭ, mia edzino kaj mi, treege kore dankas vin pro la afabla kaj tre amika letero. Ankoraŭ post kelke da tagoj, kiam mi en la tagmeza horo venis hejmen por manĝi, mi havis grandan surprizan ĝojon. Meze sur la tablo mia edzino metis du grandajn kovertojn, unu enhavanta nian belegan revuon EPĈ kaj la alia, ho, ĝi saltigis min pro ĝojo. Mia edzino ridis, ĉar kvankam 51-jara mi tamen ŝajnas tre knabeca.

Mi vere estas tre dankema al vi pro la belega libro de Lusin "Mate-naj Floroj Kolektitaj en la Vespero". Mi treege antaŭĝojis legi ĝin. Mi ja tre ŝatas Lusin. Kiom afable vi sendis al ni ankaŭ 2 belajn bildlibrojn por nia malgranda nepino Dorte.

Telefone mi diris al mia nepino: "Avo ricevis leteron de nia tre bona amiko en Ĉinio, kaj li skribas, ke li sendas du belajn bildlibrojn por vi, ĉar vi estas granda knabino kaj tre ŝatas legi ĉinajn librojn, kion do vi diras?" Komence ŝi nenion povis diri pro ĝojo, sed mi eligis kelkajn kantsimilajn sonojn kaj tuj poste ŝi tre elokvente diris: "Avo, nu vi nepre diru dankon al la afabla amiko en Ĉinio, kaj ankaŭ salutu lin, tiam li ĝojas."

Mi ja esperas, ke iam ŝi fariĝos bona esperantistino, kaj, same kiel ŝia avo, fervora leganto de nia kara El Popola Ĉinio. Ŝi tre amuziĝas, kiam mi kelkfoje malrapide legas la tekston en Esperanto.

Mi en la telefono kutimas demandi ŝin: "Kiu vi estas?" Kaj ŝi respondas: "Mi estas la ĉina knabino de Avo." Kaj kiam mi diras al ŝi: "Bone, kaj kio estas vi?" Ŝi tuj diras: "Unu heroino."

La numero 9 kun la olepentraĵo de Lusin vere vive prezentas lin, kaj la artikoloj pri la fama verkisto vere estis interesaj. Fakte li ja estis esperantisto pli bona ol multaj Esperanto-parolantaj homoj, ĉar li ja malgraŭ sia grava malsano kaj ĝis sia lasta spiro tiom multe oferis kaj batalis por la Esperanto-movado en Ĉinio.

Kiam la ĉinaj esperantistoj tradukis liajn multajn novelojn, ili donis al la mondo donacon neforgeseblan kaj faris por Lusin monumenton plej belan.

Mi sendas al vi miajn plej bonajn dezirojn. Restu vi ĉiam sanaj kaj feliĉaj, prosperon al vi ĉiuj.

de **JORGEN H. ERIKSEN**
(Danlando)

S-ro J. H. Eriksen





La aŭtoro

HONFAN:



Malsamaj Internaciecoj en Esperanto

Tio ĉi estas prelego de la aŭtoro farita en la Dua Kongreso de la Pekina Esperanto-Asocio en 1982.

— LA RED.

DU PREMISOJ DE ESPERANTO

Ĉiuj esperantistoj scias, ke Esperanto estas internacia lingvo kaj ke ĝi kreskas kaj progresas sur la fundamento donita de D-ro L. L. Zamenhof. Tial internacieco kaj la fundamento estas du nepraj premisoj de nia lingvo. Kaj ili kune donis al la lingvo bazon kaj forton por ekvivo kaj progresado.

Tamen oni ne opinii, ke tiuj du premisoj konstante harmonie kunekzistas kaj kunagadas por la bono de la lingvo. Kontraŭe, se la esperantistaro ne ĉiam zorge gardus ilin laŭ la vera senco de la du premisoj, eĉ io malagrabla povus okazi al nia lingvo.

Por plua esploro de la problemo estas necese bone kompreni la esencon de la premisoj.

MALSAMAJ INTERNACIECOJ

Kio estas la internacieco de Esperanto? Pri tio D-ro L. L. Zamenhof mem donis precizan kaj koncizan klarigon en sia letereto al N. Borovko pri la deveno de Esperanto. La koncerna paraĝrafo tekstas jene:

“. . . Mi baldaŭ rimarkis ke la nunaj lingvoj posedas grande-

gan provizon de pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia — kaj mi kompreneble utiligis tiun trezoron.”

Evidente la internacieco kuŝas en la vortoprovizo de Esperanto. Tio signifas, ke esperantaj

vortoj ne nur devas esti elprenitaj el la naturaj lingvoj kaj ne kreitaj arbitre de iu aŭtoro, sed ankaŭ iliaj formoj devas baziĝi sur multaj naciaj lingvoj, ekzemple, oni povas trovi pli-malpli similajn formojn de la vortoj “konkreta”, “soni”, “vento” en jenaj lingvoj.

esperanta	konkreta	soni	vento
latina	concretus	sonare	ventus
franca	concret	sonner	vent
itala	concreto	sonare	vento
hispana	concreto	sonar	viento
portugala	concreto	soar	vento
germana	konkret	sonate	wind
angla	concrete	sound	wind

Pri tio la fama esperantisto s-ro Louis Bastien faris rimarkindan esploron. La frukton oni povas vidi en la libro Naŭlingva Etimologia Leksikono.

De tiuj ekzemploj oni povas vidi ankaŭ, ke la internacieco de la vortoj kuŝas esence en la radikoj, sed ne la tutaj vortoj kun iliaj kunmetaĵoj kaj derivaĵoj. La similsencaj formoj de

“konkreta” en diversaj lingvoj varias unu de la aliaj, sed “konkret” estas la neŝanĝebla parto. Same tiel estas la vortoj “soni” kaj “vento”.

Parenteze, oni devas rimarki ankaŭ tion, ke la formoj en diversaj lingvoj esprimas ne ĉiam tute saman signifon, tamen ili iel portas partan sed ĉefan senco de la koncerna radikoj.

Tiaj esperantaj vortoj estas internaciaj kaj laŭfundamentaj.

Troviĝas ankaŭ alispeca internacieco en esperantaj vortoj, t.e. la tiel nomataj “fremdaj vortoj”.

Tia internacieco diferencas de la antaŭa per tio, ke la vorto eniras en Esperanton ne sole kun ĝia radiko, sed ankaŭ kun la ceteraj vortelementoj, ekz-e la afiksoj aŭ finaĵoj de la naciaj lingvoj. Ekzemplon de tia internacieco oni povas vidi en la vortoj “imperialismo”, “individualismo”, “liberalismo” k. s.

“-al” origine estas adjektiva finaĵo de certaj eŭropaj lingvoj. En la suprediritaj vortoj estas tute senbezone, laŭ esperanta vortokonstruo, konservi tian intermetitan finaĵon, ĉar apud ili troviĝas ja vortoj “imperiismo”, “individuismo” kaj ankaŭ rekomendinda “liberismo” (formo kvankam ne kutima, tamen tute logika).

Plej stranga estas la vorto “imperialismo”. Efektive, ĝi estas vorto internacia. En pluraj eŭropaj lingvoj troviĝas tiu ĉi vorto. Ankaŭ kombinoj en ĝiaj vortelementoj “imperio” kaj “imperiale” estas uzataj internacie. Iliaj signifoj montras, ke ili estas nur derivaĵoj de la nura radiko “imperi”.

Sed la fremda vorto “imperialismo” rompis la logikecon de Esperanto.

“Imperialo” signifas en Esperanto jam ne “imperio” (ĉu pro tio, ke ĝia formo kontraŭas al la vortkonstruaj reguloj de Esperanto aŭ ne), sed “surtegmenta fako de veturilo aŭ vagono”. Tial “imperialismo” ne povas esti komprenata kiel derivaĵo de “imperialo”, kaj ĝi devas stari en esperantaj vortaroj kiel memstara vorto havanta kvazaŭ ne-

nian rilaton “imperio”. Tio estas la konsekvenco de la internacieco de “fremdaj vortoj”.

Similaj tendencoj troviĝas ankaŭ en nacilingvaj personigaj sufiksoj “-ator”, “-or”, adjektiva sufikso “-iv” kaj substantiviga finaĵo “-cio” k.s.

Por personigo de iu radiko troviĝas en Esperanto ja sufiksoj “-ul”, “-ist”, krome ankaŭ la substantivaj participoj. Estas dubinde ĉu estas necese alpreni fremdajn sufiksojn “-or” (kiel en direktoro, inspektoro, kondukto-ro ktp.) kaj “-ator” (kiel en administratoro, iniciatoro, uzurpatoro, spektatoro ktp.).

Krome, enkonduko de tiaj sufiksoj enkondukis samtempe ĥaoson, ĉar “-ator” signifas jen personon jen ilon, kaj administracio jen administrantaron jen administrestojn. Tio makulas la sencoklarecon de esperantaj vortoj.

DU TENDENCOJ — DU DIREKTOJ

La sana internacieco povas esti nomata internacieco laŭfundamenta kaj la alia — tendenco naturisma.

Estiĝo de tia fenomeno en la komenca stadio de Esperanto estas komprenebla kaj tolerebla. Ĉar Esperanto estas bazita sur indo-eŭropaj lingvoj kaj la movado prosperis ĉefe ankaŭ en Eŭropo. Kiam oni alprenis iajn internaciajn vortojn el eŭropaj lingvoj, oni facile ignoris ĉu ĝi estas pura radiko, aŭ kun la nacilingvaj afiksoj aŭ finaĵoj.

Tio estis ankoraŭ tolerebla. Ĉar tiaj vortoj ja estis ankoraŭ malmultaj kaj al eŭropaj esperantistoj estis tute senĝenaj.

Sed Esperanto ja celas tutmondecon. La naturisma tendenco

ne povas sane antaŭenpuŝi la movadon al tiu ĉi celo. Unue, tio ŝokas pro la nereguleco la ne-eŭropajn esperantistojn, kaj due, tio instigas la naturisman inklinon inter amikoj de la internacia lingvo.

Detruan efikon de naturismo al E-movado, la esperantistoj jam spertis en la historio de la movado.

Ni povas citi la kazojn de sinjoroj L. Beaŭfront, O. Jespersen, E. von Wahl kiel ekzemplojn. Ili estis aŭ fervora esperantisto, aŭ varma amiko de Esp-o, Beaŭfront estis eĉ fama gvidanto en la franca periodo de nia movado. Sed fine ili estis forŝiritaj de la naturisma inklinado for de la movado kaj fariĝis iniciatintoj de iliaj propraj lingvaj projektoj, t.e. Ido, Novial kaj Occidental.

En tiuj lingvaj projektoj saturis la naturismo. Eĉ en Ido, kiu sin titolis origine “Reforma Esperanto” aŭ “Ido de Esperanto”, oni anstataŭigis la vorton “patrino” per “matro” kaj la vorton “malvarma” per “kolda” por limigi uzon de la afiksoj “-in” kaj “mal-” (Estas notinde kiom furoras nun en Esperanto tia malsanemo!).

Kompreneble ankaŭ al ili la naturismo alportis ne sukceson. Ĉar ĝi esence kontraŭas al vera internacieco, kiu estas nemankigebla animo por internacia lingvo.

Evidente nur laŭfundamenta internacieco estas nepre necesa por progreso al vera tutmondeco de nia lingvo. Se ni bone memoras la historiajn instruojn, ni faros pli bonan servon al Esperanto, ke ĝi sane kaj ĉiam kun firma fundamento marŝu al la venko.

LA DUA KONGRESO DE PEKINA ESPERANTO-ASOCIO

La Dua Kongreso de la Pekina Esperanto-Asocio okazis la 15-an kaj 16-an de januaro en la Popola Halo de Pekino. Ĝin ĉeestis pli ol 250 esperantistoj.

La kongreso faris resumon pri la laboro de la Pekina Esperanto-Asocio en la pasintaj ĉ. du jaroj. Ĝi funkciigis 17 Esperantajn kursojn, en kiuj partoprenis 700 lernantoj. Ĝi eldonis ĉinlingvan tradukon de "Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto" kaj aliajn kvar librojn, starigis rilaton kun 39 enlandaj Esperantaj organizaĵoj kaj kun nombro da eksterlandaj Esperantaj organizaĵoj kaj akceptis 25 esperantistojn el sep landoj.

La kongreso ricevis 15 prelegojn, kiuj traktis diversajn fakojn de Esperanto. La brita esperantisto Geoffrey Sutton, kiu laboras en la redakcio de EPĈ, faris longan paroladon "Kio estas Esperanto kaj kia estos ĝia estonteco". La franca esperantisto s-ro Bernard Jahier, kiu laboras kiel franclingva fakulo en "Pekina Revuo", sendis sian mesaĝon al la kongreso. La kongreson ĉeestis Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, Lin Liyun, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, fama verkisto Lou Shiyi, ĉefredaktoro de "China Daily" Liu Zunqi, respondeculo de la Ĉina Mara Buroo Zhang Yulin, fama ekonomikisto Wu Dakun, konsilisto de la Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo Luo Jun, gvidantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo Chen Yuan kaj Zhang Qicheng kaj vicĉefredaktoro de EPĈ Mao Dafeng. Lin Liyun, Lou Shiyi, Luo Jun, Zhang Yulin, Wu Dakun, Lin Yixin kaj Mao Dafeng estis elektitaj kiel honoraj konsilantoj de la Pekina Esperanto-Asocio.

DISAŬDIGA ESPERANTO-KURSO FUNKCIIGITA DE LA POPOLA RADIOSTACIO EN TAIYUAN

La 4-an de januaro la Popola Radiostacio de Taiyuan, la ĉefurbo de Shanxi-provinco, ekfunkciigis disaŭdigan kurson de Esperanto, kiun gvidas Ma Zhiyi kaj Fu Xue dum duonhora ĉiutage escepte de dimanĉo.

LA WUHAN-A ESPERANTO-ASOCIO OKAZIGIS LABORKUNVENON

En la fino de 1981 la Wuhan-a Esperanto-Asocio okazigis laborkunvenon kun daŭro de du tagoj. Krom resumi la laboron de 1981, la laborkunveno ankaŭ diskutis pri la plano de edukado por 1982 k.a. kaj reviziis la statuton de la asocio. Ĉeestis la kunvenon Sun Jingxian, vicedestro de la Radiodisaŭdiga Buroo de Hubei-provinco, Zhou Juguang, vicedestro de la Kultura Buroo de la urbo Wuhan, kaj Xue Chengzhi kaj Xia Bangxin, respondeculoj de la Hubei-a Esperanto-Asocio. Dum la laborkunveno oni festis la 122-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

FONDIGIS LA PREPARA GRUPO DE LA YANGZHOU-A ESPERANTO-INSTITUTO

Dank' al la varma subteno de la magistrato de Yangzhou kaj la Esperanta Studrondo de Jiangsuprovinco, la prepara grupo de la Yangzhou-a Esperanto-Instituto fon-

diĝis en la komenco de la kuranta jaro. Antaŭ ĝia fondiĝo okazis amuzkunveno de esperantistoj, en kiu laŭinvite partoprenis esperantistoj el la urboj Yangzhou kaj Zhenjiang kaj la gubernioj Gaoyou, Jiangdu kaj Hanjiang. Ili interŝanĝis spertojn pri lernado de Esperanto kaj prezentis programerojn.

APERIS ĈINLINGVA ELDONO DE LA SCIENC-FIKCIA ROMANO "MAŜINMONDO"

Antaŭ nelonge la eldonejo Perspektivo publikigis la scienc-fikian romanon "Maŝinmondo" Esperante verkitan de la hungara aŭtoro S. Szathmari, unu el la famaj satiristoj de la mondo. Ĝin ĉinigis Ding Wei.

LA 30-A KONGRESO DE ESPERANTISTOJ EN KANSAJO, JAPANIO

Ĉi-jare la kongreso, organizata de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj Takatuki-Esperanto-Societo kaj okazigota la 12-an kaj 13-an de junio 1982 en la urbo Takatuki, ĝuos sian 30-jaran jubileon.

Okazos dum la kongreso publika simpozio, kultura festivalo, apartaj kunsidoj, oratorkonkurso, ekspozicio, libroservo k.a.

SIMPOZIO PRI KIBERNETIKO-ESPERANTO-INTERLINGVISTIKO

Laŭ iniciato de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko de Rumanio, kunlabore kun la Universitato



Esperanta kurso disaŭdiga de la radiostacio de Taiyuan

de Braşov kaj la Kulturdomo oni organizis je la 30-a de novembro 1981 simpozion pri Kibernetiko-Esperanto-Interlingvistiko en la kondiĉoj de la scienc-teknika revolucio. Komunikaj estis prezentaĵoj de prof. d-ro I. Florian Bociort k.c.

LA KVARA TUTLANDA RENKONTIĜO DE KEL

La 4-a tutlanda renkontiĝo de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko okazis en Timiŝoara, Rumanio, de la 18-a ĝis la 20-a de sept. 1981. Ĝin ĉeestis profesoroj, sciencaj esploristoj, gazetistoj, studentoj, lernantoj kaj laboristoj el multaj urboj.

Dum la renkontiĝo oni okazigis debaton pri "La demokratiigo de internaciaj sciencoj kaj kulturaj rilatoj", kiu montris la konvinkforton de rumanaj sciencistoj-batalantoj por Esperanto kaj la validecon de la argumentoj. Okazis en la granda halo de la Universitato de Timiŝoara ankaŭ la ekspozicio "Esperanto-Interlingvistiko" kun pli ol 450 libroj kaj eldonaĵoj en Esperanto.

HONORE AL D-RO ZAMENHOF KAJ S-RO WARINGHIEN

La 13-an de decembro 1981, honore al d-ro Zamenhof kaj por festi la 80-jariĝon de s-ro Gaston Waringhien, okazis Zamenhofa Bankedo



Honore al d-ro Zamenhof kaj s-ro G. Waringhien

kune organizita de la Pariza Federacio de Unuiĝo Franca por Esperanto, la parizaj grupoj de SAT kaj SAT-Amikaro. Ĝi arigis ĉirkaŭ 120 esperantistojn.

S-ro Waringhien plue kontribuas al la riĉigo de la Esperanto-literaturo, i.a. per tradukoj el klasikaj verkoj de la pasintaj jarcentoj.

ESPERANTO EN GUJAN-MESTRAS

En la urbo Gujan-Mestras en la sudokcidenta parto de Francio, apud Bordojo, estas Esperanto-grupo vigliganta ekde kelkaj jaroj. Kun konsento de la urbestro ĝi inaŭguris la kulturen centron nomatan "L.L. Zamenhof".

Du kursoj okazas en la urbo: unu por plenaĝuloj, la alia en mezlernejo por gejunuloj.

ESPERANTO-GRUPO EN BREMEN

En la urbo Bremen, FR Germanio, de la 2-a ĝis la 4-a de okt. 1981 oni festis la 75-an datrevenon de la fondiĝo de la bremena Esperanto-grupo dum la Nordgermana Esperanto-Tago. Partoprenis 110 esperantistoj, el kiuj 25 venis el la najbaraj landoj Nederlando, Belgio kaj Danlando. Al la jubileo oni esprimis korajn gratulojn. La protektanto de la kunveno estis la senatano pri klerigo kaj edukado v. Hassel, kiu speciale akcentis la belecon kaj utilecon de Esperanto.

Inaŭguro de la Kultura Centro "Zamenhof" en Gujan-Mestras, Francio



LA PROGRESO DE ĈINA GIMNASTIKO

ĈINAJ sportistoj partoprenis en la 21-a Mond-ĉampionecca Gimnastika Konkurso en Moskvo dum la lasta tagdeko de novembro 1981, kie la virina teamo gajnis la duan lokon kaj la vira teamo la trian lokon. En individuaj konkursoj, ili gajnis ankoraŭ du ĉampionecojn, tri duajn lokojn kaj unu trian lokon. Nia lando estis honorita de ses oraj medaloj. En la Moskva Sporthalo, dufoje sonis la nacia himno de Ĉinio kaj okfoje leviĝis ĝia kvinstela ruĝa nacia flago.

Antaŭ pli ol 20 jaroj nia gimnastika teamo estis senfama kiam ĝi unuafoje partoprenis en la mond-ĉampionecca konkurso en 1958. Sed nun nia lando envicigis inter la tri potencoj de la monda gimnastika rondo kaj konkuris kun "grandaj regnoj de gimnastiko", kiuj disvolvas la sporton jam ĉirkaŭ cent jarojn.

Antaŭvespere de la ĉi-foja konkurso, sinsekvaj akcidentoj okazis en la ĉina teamo. Sportistino Wen Jia vundis al si la piedon en trejnado je la 18-a de novembro. La sekvan tagon ankaŭ nia ĉefa gimnasto Li Ning suferis de piedvundo, kiam li sin ekzercis en transsalto de senansa ĉevalo. Lia dekstra maleolo ŝveliĝis. La trejnisto portis lin surdorse for de la ekzercejo. Ĉio ĉi malfavoris la ĉinan teamon kaj pezigis la koron de niaj sportistoj.

En julio de 1981 la nova stelo de gimnastiko Li Ning jam akiris tri orajn medalojn en la Monda Studenta Sportkunveno kaj fariĝis okulfrapa inter mondaj gimnastoj. Ĉi-foje post lia vundiĝo kelkaj eksterlandaj amikoj zorge demandis al nia teamo, ĉu li partoprenos en la konkurso aŭ ne. La teamo diskutis inter si pri tio kaj decidis ne partopre-

nigi lin. Sed, neatendite, post nur tri tagoj, li denove aperis sur sportejo matene por sin ekzerci. Li kuradis, saltadis kaj kaŭradis antaŭ siaj trejnisto kaj kolegoj kaj diris: "Nun mi fartas pli bone ol antaŭe. Mi povas partopreni en la konkurso." Tamen oni vidis, ke lia maleolo restas ankoraŭ ŝvela kaj ke li multe suferis de tiuj simplaj movoj, kunpremante siajn dentojn. Fine, la teamestro akceptis lian peton. Li obstine finis la devigajn movojn en la konkursejo, kaj oni apenaŭ rimarkis, ke li estas ĵus vundita. Tio kortuŝis la teaman kuraciston ĝis larmoj. Masaĝante al li la maleolon, li laŭdis: "Li Ning, ho Li Ning! Kiel brava vi estas!"

Post la konkurso de devigaj movoj, venis tiu de memelektitaj movoj. La ĉina teamo de ses gimnastoj ludis glate en paralelado kaj transsalto de senansa



Ĉinaj sportistinoj kaj iliaj trejnistoj kaj pianisto, partoprenantaj la 21-an Mond-ĉampioneccan Gimnastikan Konkurson

ĉevalo. Sed laŭ la poentoj ĝi ankoraŭ estis post la teamo de DDR. Komenciĝis konkurso de reko. Tong Fei de Ĉinio faris grandan cirkulon per unu brako. Li gajnis la plej altan poentaron, 10 poentojn, pro kio la akumulitaj poentoj de Ĉinio fariĝis egalaj al tiuj de DDR. Ankaŭ aliaj ĉinaj gimnastoj atingis proksimume 10 poentojn en ludado de duringo, planka gimnastiko k. a., tiel ke la ĉina teamo fine superis la orient-germanan kun 583.90 poentoj kaj akiris la trian lokon.

En la virina teama konkurso de devigaj movoj, okazis intensa konkuro inter Sovetunio, DDR, Rumanio kaj Ĉinio. La ĉina teamo de ses knabinoj venkis la orient-germanan kaj rumanan kun totale 384.60 poentoj kaj gajnis la duan lokon.

Ĉinaj sportistoj partoprenis ankaŭ en la individuaj finaloj. Li Yuejiu de Ĉinio gajnis oran medalon en vira planka gimnastiko, kies movoj estis karakterizitaj per perfekteco, originaleco kaj altgrada malfacileco. En la finalo li gajnis la unuan lokon kune kun Korolev de Sovetunio.


Antaŭ la individua finalo de ansa ĉevalo, ĉina Li Xiaoping jam partoprenis 18-foje en diversaj ludoj de la konkurso. Ĉi-foje li ludis bone kaj en la finalo li gajnis 10 poentojn per siaj ege malfacilaj movoj kaj enkonduko de ĉina stilo. Lia poentsumo estis egala al tiu de M. Nikolaj el DDR, tiel ke ili ambaŭ ĉampioniĝis. Pro tio Ĉinio havigis al si duan oran medalon.

Verdire, la gimnastika arto de kelkaj potencaj teamoj estis sur


preskaŭ sama nivelo. Por akiri venkon plej gravis aplombo. Ĉina knabino Wu Jia'ni unuafoje partoprenis en tiu monda konkurso, sed timante neniun fortan konkuranton, ŝi libere kaj senĝene ludis sur trabo. Ŝiaj movoj estis belaj, elegantaj kaj danĝeraj kaj rikoltis varmajn aplaŭdojn. Ankaŭ ĉina gimnastino Chen Yongyan sukcesis per sia originaleco de movoj. Ambaŭ knabinoj venkis la ĉampionon pri trabado de la lastaj olimpikoj.

Jen ĉina knabino Ma Yanhong altiris atenton de la spektantoj. Ŝi fariĝis ĉampiono de ŝtupa paralelo antaŭ du jaroj en la pasintfoja Monda Gimnastika Konkurso. Nun ŝi multe progresis en sia sportarto. Ĉi-foje en la teama konkurso de memelektitaj movoj, kiam ŝi faris grandan korpsvingon trans malsupra stango kaj supreniĝon kun korpo kuntirita, subite rompiĝis ŝia manprotektilo. Malgraŭ tio ŝi sukcesis kapti la stangon kaj daŭrigis sian ludon. Tra la tuta halo eksplodis longtempaj hurado kaj manklakado.

La monda gimnastiko progresas tre rapide kaj postulas ĉiam pli grandan malfacilecon de movoj. Sukceso de ununura movo devenas de severa trejnado, zorgema polurado kaj sennombraj ekzercoj. La gimnastinoj krome devas modere manĝi por teni sian korpon ĉiam svelta. Ĉinaj gesportistoj kaj trejnistoj jam elportis multajn penojn, sed ili bone scias, ke pli zigzaga estas la vojo irota ol la irita, tial ili decidis ankoraŭ pli multe klopodi por atingi mondan avangardan nivelon.



Wu Jia'ni



Li Xiaoping

LA 30-A DATREVENO DE LA FONDIĜO DE "ĈINIO EN KONSTRUADO"

"Ĉinio en Konstruado" fondita de Song Qingling (1893-1981), la honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko kaj edzino de D-ro Sun Jatsen, estas sinteza monata gazeto eldonata en la ĉina, angla, hispana, franca, araba, germana kaj portugala lingvoj kaj distribuata al pli ol 140 landoj kaj regionoj.

Por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la gazeto,

La fondinto de "Ĉinio en Konstruado" Song Qingling



je la 20-a de januaro 1982, ĝia redakcio okazigis memoran kunvenon en la antaŭa loĝejo de Song Qingling en Pekino. Ĝin ĉeestis pli ol 400 personoj, inter kiuj estis Xu Deheng, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola kongreso, Huang Hua, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj ministro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj, Zhou Peiyuan, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, Zhu Mu-zhi, vicedestro de la Propaganda Departemento de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, famaj diversrondaj personoj, fremdlandaj amikoj, kiaj Rewi Alley, George Hatem kaj Rose Smith, kaj fremdlandaj specialistoj kaj laborantoj de la redakcio. En la kunveno oni montris fotojn, ĵurnalajn tranĉitaĵojn kaj leterojn de legantoj, kiuj konigas ĝian disvolviĝon en la pasintaj 30 jaroj.

Post la fondiĝo de la gazeto, prezidanto Maŭ, ĉefministro Ĝoŭ kaj vicĉefministro Chen Yi donis instrukciojn pri plibonigo de la gazeto. La fondinto Song Qing-

ling persone skribis pli ol 30 artikolojn por la gazeto.

"Ĉinio en Konstruado" multe faris raportojn pri sukcesoj de Ĉinio en konstruado, popola vivo, kulturo, arto kaj aliaj al la legantoj de diversaj landoj en la mondo.

Ĉiu numero de la duon-oktava gazeto havas ĉ. 72 paĝojn kun 16 koloraj bildpaĝoj. Krom artikoloj komunaj por la diverslingvaj eldonoj la redakcio utiligas ankaŭ apartajn artikolojn por kontentigi malsamajn bezonojn de la legantoj. En la pasintaj 30 jaroj la redakcio eldonis ankaŭ 28 librojn, ekzemple, "Ĉinio en Ŝanĝiĝo", "Ĉinaj Poŝtmarkoj", "Aboco de Hanlingvo", "Dek Kvin Urboj de Ĉinio", "Memore al Song Qingling" k.a.

La renomo de "Ĉinio en Konstruado" nun disvastiĝas tra la mondo. Ĝiaj artikoloj kaj bildoj estas ofte reaperigitaj en fremdlandaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Diverslandaj legantoj ofte skribas al la redakcio kaj per tio ili esprimas sian amikecon al la ĉina popolo kaj subtenon al la gazeto.

"Ĉinio en Konstruado" en plurlingvaj eldonoj





Kongresejo

Chu Tunan (la dua de dekstre), honora prezidanto de PEA, Chen Yuan (la kvara de dekstre), vicprezidanto de ĈEL, Zen Hójaŭ (la unua de dekstre), vicprezidanto de PEA, kaj Geoffrey Sutton (la tria de dekstre), kiu laboras portempe en nia redakcio



La Dua Kongreso de Pekina Esperanto-Asocio

Fotoj de LI CHUNGENG

Lin Liyun (meze), vicprezidanto de la Ĉina Virina Federacio, en la kongreso






Ge Baoquan (dekstre), prezidanto de PEA, interparolas kun Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, en la kongreso.

Junaj esperantistoj en la kongreso

Fama ĉina tradukisto kaj verkisto Lou Shiyi (maldekstre) intervidiĝas kun Chen Zhao-ying, kiu instruis al li Esperanton.



Lernantoj de la porinstruista Esperanto-kurso de la Pekina Fremd-lingva Instituto kantas Esperante.






ĈINAJ ESP-ISTOJ

Hu Menggu

**Juna instruistino
Hu Menggu**

Fotoj de LI CHUNGENG

Hu Menggu estas instruistino de la interna pediatrio de la Hangzhou-a Flegistina Lernejo. Ŝi amas sian profesion kaj sin montras fervora por nia Esperanto-movado. En la aŭtuno de 1981 ŝi konatiĝis kaj amikiĝis kun membroj de la Delegacio de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.




Esperanta konversacio






Hu Menggu kun usonaj gesamideanoj

Ŝi donas lecionon pri sia fako.



Hu Menggu instruas Esperanton al sia infano.





La Sanatorio Taihu por Laboristoj

ZHANG QINGZHEN:

Sanatorio de Taihu-lago

LA pitoreska Taihu-lago estas fama turisma loko en la orienta Ĉinio. Ĉiujare ĝin vizitas tre multaj ĉinoj kaj alilandanoj. La lago estas brakumita de montetoj kaj ligita kun riveroj. La duoninsuloj, valetoj kaj golfetoj, ĉiuj estas tre plaĉaj. La lago ĉarmas kiel la Okcidenta Lago en la urbo Hangzhou kaj impresas kiel maro. La pejzaĝo magnete altiras turistojn al si.

Ĉe la bordo de la pitoreska lago troviĝas kelkaj sanatorioj. La sanatorio Taihu por laboristoj de Jiangsu-provinco, kiun mi volis viziti, situas sur kvieta,

naturdotita monteto sur insuleto meze de la lago.

Mi atingis la lokon en la fino de la pasinta oktobro. En tiu tempo tie ankoraŭ prosperis diversspecaj vegetaĵoj. Mi eniris en la sanatorion kaj min salutis la disŝprucantaj akveroj el fontano, prosperaj aromaj herboj kaj heĝo el osmanoj kaj ties branĉoj. La belaj unuetaĝaj domoj kaj malaltaj etaĝdomoj sin kaŝis inter verdaj arboj. Ĝuste kiam mi rigardis absorbite, iu servisto, prenante min por nova paciento, venis renkonte al mi kun rideto. Preninte

de mi la vojaĝsakon, li volis konduki min al la akceptejo por min registri. Mi diris mian intencon kaj tiam li ekridis kaj montris etaĝdomon, dirante, ke tie oni rigardas prezentadon de la ensemblo de la Ĉina Tutlanda Ĝenerala Laborista Sindikato. Mi tuj kuris al salono en la tria etaĝo, kaj vidis, ke iu ludas sornaon (blovinstrumento). La gaja muziko estis akompanata, de tempo al tempo, de aplaŭdado. La ĉambro plenis de gajeco.

La pacientoj kvankam venis el diversaj lokoj, tamen vivas tie harmonie kiel samfamilianoj.



En ĉambro por korpaj ekzercado

Tio profunde impresis min. La sanatoriestro diris, ke la sanatorio estas unu el la ĉefaj sanatorioj starigitaj per investaĵo de la Ĉina Tutlanda Ĝenerala Laborista Sindikato. Ĝi kovras areon de 130,000 kvadrataj metroj kaj havas domojn kun plankareo de 13,000 kvadrataj metroj. Ĝi ekfunkciis en 1952 kaj povas samtempe akcepti 400 kuracatojn. Plejparto de la kuracatoj estas laboristoj, literaturistoj, edukistoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj kadroj el Jiangsu-provinco, kie sin trovas Taihu-lago, kaj ankaŭ ordinara laboruloj el la aŭtonomaj regionoj de Tibeto, Xinjiang, Ningxia k.a. Ili suferas kronikajn malsanojn, kiel hipertensio, korafekcioj, gastroptozo kaj trakeito, aŭ vundiĝis pro laborakcidentoj, aŭ ricevis operacion kaj tamen povas prizorgi sian vivon. Inter la akceptitoj troviĝas ankaŭ modeloj-laboristoj kaj avangardaj laboruloj, kiuj ripozas por mallonga tempo. En someraj ferioj oni akceptas ankaŭ grupon post grupo da instruistoj. La kuracatoj restas tie du monatojn, kaj la tempo povas esti longigita laŭ la kuraca bezono. La ŝtato pa-

gas por ili. Dum restado en la sanatorio la kuracatoj ricevas la tutan salajron kaj monhelpon por la ĉiutaga manĝo.

La sanatorio havas ĉiuspecajn kuracaparatojn kaj instalaĵojn por la vivo kaj amuzo. Nun funkcias tie kvin sekcioj por kuraci malsanojn de la digestaj organoj, brakoj kaj gamboj, spir-organoj, kardiovaskuloj kaj cerbaj angioj. Pli ol 70% de la kuracatoj rimarkinde resaniĝis.

Mi vere ekenviis ilian agrablan kaj regulan vivon post kelktaga kunloĝado kun ili.

La kuracatoj kutimas leviĝi frumatene, ĉar tiam la aero estas plej freŝa. Iuj el ili kuretas aŭ promenas ĉirkaŭ la lago, aliaj faras en arbaro la gimnastikon Tajĝiĉuan, korpajn ekzercojn kun ligna glavo aŭ spiran gimnastikon, triaj ĝuas la verdondan lagon kun la nebulaj konturoj de 72 montpintoj ĉirkaŭe, kaj kvaraj aliras montosupron por rigardi sunleviĝon. Estas tre ĉarma kaj rava la pejzaĝo de la lago.

Antaŭtagmeze estas kurac-tempo. Ĉiutage el radio aŭdiĝas

orelplaĉa gimnastika muziko, laŭ kiu la kuracatoj faras la gimnastikon Tajĝiĉuan. Tio estas unu el la kuracmetodoj. La kuracatoj faras la gimnastikon Tajĝiĉuan antaŭ kaj post la tagmezo. Ili kuras, promenas aŭ montogrimpas, farante mildajn kaj rapidajn movojn en kombino. En la sanatorio estas granda sanigejo kun diversaj sanigaj aparatoj, kiel elektra ĉevalo, endomaj grimpilo, remilo kaj biciklo, kaj surmure pendas desegnoj pri diversaj gimnastikaj ekzercoj. Sanigejestro Wu Bao-yu diris al mi: "Por kuraci diversajn malsanulojn, nia sanatorio elpensis 20 gimnastikajn ekzercojn por subigi hipertensio kaj faciligi la funkciadon de la koro, helpi la spiradon, mildigi la gastroptozon ktp., kaj elpensis ankaŭ 18 spirajn gimnastikojn. Dank' al konstanta ekzercado oni povas pliigi la varmokvanton en sia korpo kaj fortigi sian sanon, pro kio la gimnastikaj ekzercoj plaĉas al la kuracatoj."

Mi rigardis ankaŭ la ĉambrom por fizika terapio, kie staras pli ol 20 ordaj kaj puraj litoj en du vicoj. Apude staras aparatoj de alt-, mez- kaj malaltfrekvenca kurento por elektroterapio, aparatoj de intermita kurento, aparatoj por terapio per nigra lumo (nevideblaj transviolaj aŭ transruĝaj radioj) k.s. Kviete kuŝante, la pacientoj estis kuracataj per ultrasona, lasera, transruĝa, transviola kaj aliaj radioaktivaj terapioj. Tiu ĉambro akceptas ĉ. 200 malsanulojn ĉiutage. Tie estas aplikataj ankaŭ akupunkturo, masaĝo kaj vaksoterapio. Kaj masaĝo plej interesas la kuracatojn. Iu mezaĝulo ĝoje diris al mi, ke liaj lumbo kaj gamboj doloradis lin jam multajn jarojn, sed la doloro multe

mildigiĝis dank' al masaĝo. Por konvinki min, li eĉ prezentis por mi boksan gimnastikon.

La sanatorio aplikas la ĉinan kaj okcidentan medicinojn en kombino kaj kuracas kronikajn malsanojn laŭeble per ĉinaj drogoj. Chen Jian, 38-jara kuracisto de la ĉina medicino, trovis ŝaton ĉe la kuracatoj ne nur pro sia eminenta kuracarto, sed ankaŭ pro sia ĝentileco kaj afableco. Ŝin vizitadas ankaŭ pacientoj kuracataj en aliaj sekcioj. Virino Chen Yuying, trafita de seka sindromo, sentis doloron en ĉiuj siaj artikoj, suferis perdon de kapharoj kaj terure febris de tempo al tempo. Ŝi regis siajn malsanojn per medikamento. Chen Jian tion esploris kaj donis recepton. Preninte kvin tizanojn, la paciento evidente resaniĝis.

Posttagmeze estas ripoztempo. Siestinte, kuracatoj ludas tablotenison aŭ ŝakon en klubo, legas libron aŭ ĵurnalon, aŭ promenas en proksimaj lokoj. La sanatorio ankaŭ ĉirkaŭveturigas la kuracatojn per plezurŝipo sur Taihu-lago aŭ ekskursigas ilin al Hangzhou, Suzhou kaj aliaj pitoreskejoj por riĉigi ilian vivon.

La regiono de Taihu-lago estas lando akvoriĉa, kiu abundas je freŝaj fiŝoj, salikokoj kaj kraboj, kio plibeligas ilian ĉiutagan manĝon. La kuiristoj preparas malsamajn pladojn por tiuj suferantaj de malsamaj kronikaj malsanoj, ekz. pladoj sen salo, sen sukero aŭ kun malmulta graso por la diabetuloj kaj renituloj.

Dank' al la efika kuracado kaj regula vivo en la sanatorio multaj reakiris sian sanan aspekton, ke ili fariĝas preskaŭ nerekonblaj. La 51-jara Xu-Loucun sufe-

ris plurajn kronikajn malsanojn. Kiam li venis al la sanatorio, lia vizaĝo montriĝis griza, liaj brakoj kaj gamboj malfortiĝis, kaj lia koro batis 160 fojojn ĉiuminute kaj li anheladis de tempo al tempo. Kiam li estis hejme, li ripozadis kaj glutadis diversajn medikamentojn, tamen tio ne multe efikis. Poste li venis al Taihu-lago kaj lernis, kiel aliaj, la spiran gimnastikon kaj la gimnastikon Tajĝiĉuan. Matene li kuretis. Kaj oni kuracis lian trakeiton per ultrasona ŝprucigilo. Post 45-taga kuracado li ne plu tuis kaj ekmanĝis pli multe. Lia korpo fariĝis peza kaj li montriĝis tre vigla, tiel ke oni ne povas imagi al si, ke lin iam turmentis pluraj malsanoj. Li diris al mi: "En la sanatorio mi ne nur resaniĝis, sed eĉ ekamis sporton, kiun mi ne volis antaŭe. Tie mi ellernis metodojn por fortigi la korpon. Ŝajnas al mi, ke mi rejuniĝis."


Inter la kuracatoj troviĝis 80-jara laboristo Gao Biao el la fama Fabriko de Argilaj Homfiguroj en Huishan. En sia 11-a jaro li eklernis modli argilajn homfigurojn versimilajn. Pro

lia granda aĝo kaj apopleksio liaj maldekstraj brako kaj gambo estis sensentaj, kaj li piediris kun granda malfacilo. Veninte en la sanatorion, li estis traktata de kuracistoj kaj flegistinoj kiel samfamiliano. Ili ne nur kuracis lian malsanon kaj portis al li medikamentojn, sed ankaŭ helpis lin piediradi. Gvidantoj de la fabriko vizitadis lin kunportante al li freŝajn fruktojn kaj tonikajn nutraĵojn. Antaŭ tio, li estas forte emociita. Li diris al mi: "Tia homo kiel mi povas vivi fean vivon en la sanatorio, pri kio mi neniam sonĝis."

La ordinaraĵ laboruloj, kiel Gao Biao, konsistigas plejparton de pli ol 2,300 kuracatoj kiujn la sanatorio ĉiujare akceptas. Mi vizitis ankaŭ aliajn sanatoriojn apud la lago, kiuj akceptas ĉefe laboristojn kaj kadrojn ĉe la baza nivelo, aŭ teknikistojn, aŭ altrangulojn. Estas sufiĉe multaj kuracatoj ankaŭ en tiuj sanatorioj.

Mi finis la vojaĝon, tamen la ĉarmaj pejzaĝoj de la lago kaj la vivo de la ordinaraĵ kuracatoj restas profunde en mia memoro.


Kuracatoj faras korpajn ekzercojn kun ligna glavo.





La vivo de kamparana familio

de ZHU RONGDE



La aŭtoro

39-jara legomkulturisto Zhu Rongde estas en la komunumo Yangming en la antaŭurbo de Wuxi — produktejo de fiŝoj kaj rizo sude de Jangzi-rivero. Diplomito en elementa mezlernejo, li ekokupis sin per agrikultura produkto. Lia edzino estas laboristino de la benzinmotora fabriko. El lia rakonto pri lia vivo, niaj legantoj povas vidi novajn ŝanĝigojn en la ĉina kamparo.

— La Red.

Mi estas kamparano en la antaŭurbo kaj ĉefe okupiĝas pri kulturado de legomoj. Nia brigado Jinxing konsistas el naŭ produktaj taĉmentoj, ĝi havas 44.8 hektarojn da kampoj por legomoj, 3 hektarojn da ĝardenoj de pomoj, mandarinoj, persikoj k.a. Tamen 90% de la enspezo de la brigado venas de neagrikultura produktado kaj sep malgrandaj fabrikoj.

Mi estas estro de produkta taĉmento. En la kamparo taĉmentestro estas tre peniga ofico. Mi kiel ordinara kamparanoj laboras en la kampo kaj ricevas rekompencojn laŭ la laborpontoj. Krome mi devas plani diversajn laborojn, ekz. semadon, transplantadon, sterkadon kaj rikoltadon, kaj prizorgi kreskon de plantoj. Ĉiutage, post kiam komunumanoj revenas hejmen fininte sian laboron, mi

devas iri legomkampojn por ekzameni la plenumitajn laborojn. Tamen mi devas konfesi, ke en la lastaj 2-3 jaroj, la laboro por mi estas multe pli facile plenumebla, ĉar nia taĉmento estis dividita en kelkajn produktajn grupojn, ĉiu grupo kulturas sian parton kaj plenumas produktotaskon asignitan de la taĉmento. Se iu grupo super-

plenumas la produktotaskon, ĝi ricevas premion; se ne, ĝi devas kompensi la perdon. Tiu produktotaĉmentotasko estas utila al la ŝtato, kolektivo kaj individuo. Ĝi rilatigas la produkton rekte kun la enspezo de la komunumanoj. Pro tio ili metas sian tutan forton sur la produkton. Tiuj kamparanoj, kiuj posedas teknikon aŭ kulturen scion, ne

Zhu Rongde rikoltas brasikon.



plu iris al la urbo por serĉi vivrimedon kaj nun volonte laboras en la kamparo. Tiu ŝanĝiĝo estas frukto de la nova politiko praktikita de la popola registaro ekde 1978 por stimuli la kamparanojn al agrikultura produkto.

Ĉinio estas fame konata kiel hortikultura lando. Ĝi havas ordinarajn legomojn de pli ol 130 specoj de ĉ. 40 familioj. Mi volas plimultigi specojn de la legomoj, tial mi komencis legi multajn librojn pri legomkulturo por posedi sciojn pri semado, transplantado kaj flegado de novaj legomspecioj.

Nia brigado estas kompare riĉa en la kamparo ĉu sude de Jangzi-rivero aŭ en la tuta lando. Precipe en la lastaj 2-3 jaroj, niaj individua kaj kolektiva enspezoj senĉese plimultiĝas. Nun la plej alta jar-enspezo de komunumano en nia taĉmento superis 2,000 juanojn, la ĝenerala enspezo superis 1,000 juanojn. La meznombra jar-enspezo de ĉiu loĝanto de nia brigado atingis 300 juanojn. Tio ne inkluzivas enspezojn el flankokupoj kaj la private uzata parcelo.

En la brigado la vivo de mia familio estas meznivela. En

1978 mi enspezis pli ol 800 juanojn kaj en 1981 1,400 juanojn (egalaj al unujara salajro de sperta laboristo). Krome, mia edzino ĉiujare enspezas 500 juanojn. Ni havas du infanojn. La 14-jara filo lernas en elementa mezlernejo, kaj la 11-jara filino en elementa lernejo. Ĉiujare ni elspezas 400 juanojn por vivteno kaj deponas 1,000 juanojn en banko. En 1980 ni aĉetis biciklon, televidilon kaj elspezis 3,000 juanojn por konstrui duetaĝan domon. Kurantaj mi volas aĉeti stereofonian aparaton por ke ni povu aŭskulti muzikon kaj la infanoj povu lerni fremdan lingvon. Mi kaj mia edzino havas malaltan klerecon. Ni esperas, ke niaj gefiloj estos klerigitaj. Nun ni intencas akumuli monsumon, por ke ili estonte povu viziti altlernejojn.

Plimultiĝis la kolektiva enspezo. Surbaze de tio, la brigado kaj la produktaj taĉmentoj ne nur plimultiĝis la totalan akumulon, sed ankaŭ elspezis monsumon por bonstatigo de la komunumanoj. La infanoj de komunumanoj povas senpage viziti infanĝardenon, elementan lernejojn kaj mezlernejojn. Ni ĝuas senpagan kuracon same kiel oficistoj kaj laboristoj en la urbo kaj akuŝintino ricevas nutran

subvencion de 20 juanoj kaj havas 56-tagan ferion. Se ŝi volas, ŝi povas ricevi senpagan steriligan operacion kaj monhelpon de 50 juanoj. Krome la produkta taĉmento senpage instalas akvotubon por multaj komunumanaj familioj, asfaltis la vojojn kaj plantis arbidojn ĉirkaŭ la domoj. Dank' al tio ni havas belan medion.

La brigado konstruis por ni "Novan Vilaĝon de Komunumanoj". Ĝi havas unuece projektitajn duetaĝajn domojn: En la dua etaĝo estas dormoĉambroj kaj en la teretaĝo kuirejo kaj gasta ĉambro. Antaŭ domo estas parcelo por privata uzo de komunumanoj por kulturi legomojn kaj fruktarojn; malantaŭ domo estas korto, en kiu oni povas bredi porkojn kaj kokojn.

Estas menciinde, ke ekde 1978 ĉiu 65-jara kamparano aŭ 60-jara kamparanino, kiu partoprenis en kolektiva laboro pli ol 5 jarojn, povas ricevi pension. Nun en la brigado 320 maljunuloj ricevas pension.

Mia 68-jara patrino estas unu el la unuaj emeritoj, nun ŝi ĉiujare ricevas pension de 120 juanoj. En nia lando kamparanoj antaŭe ne povis ricevi tian pension, nur la ŝtataj laboristoj kaj oficistoj povas ricevi pension post emeritiĝo. Kompreneble, nun nur kompare riĉaj komunumanoj komencis praktiki tian emeritan sistemon.

Mia patrino diris, ke ŝi neniam songis pri tiel bona vivo. Nun ŝi loĝas ĉe mia frato. Mi kaj mia alia frato ĉiujare donas al ŝi 80 juanojn. Pro tio ŝi povas senzorge pasigi siajn lastajn jarojn. Tamen ŝi diris, ke ŝi jam kutimiĝis al laboro kaj preferas labori ol ripozi.

Nova vilaĝo de komunumanoj



HUMURAJO DE LA ANTIKAŬA ĈINIO

“Estas pli grave lerni naĝadon!”

Bildoj de LIN HANGSHENG

1. Iu nekompetenta kuracisto kaŭzis morton al paciento per sia miskuracado. La familianoj de la mortinto ligis lin, por ke li pagu sian vivon por la morto.
2. Nokte la kuracisto ŝtele senŝnurigis sin, transsaltis la muron kaj forkuris.
3. Li falis en grandan riveron tuj transe de la muro. Estis feliĉe, ke li scipovas naĝi.
4. Noktomeze li revenis hejmen kaj vidis sian filon sidanta super medicina libro. Li tuj diris: “Filo mia, estas pli grave lerni naĝadon antaŭ ol legi medicinan verkon!”



1



2



3



4

Ŝi ĉiam dommastrumas por ni. Ŝi estas ankoraŭ sufiĉe sana. Pasintjare, kiam la brigado organizis komunumanojn ekskursi al la fama pitoreskejo Huangshan-monto, mia patrino, helpate de mi, plezure surgrimpis la monton.

Ni kamparanoj esperas, ke la vivo pliboniĝos senĉese. Ĉiam, kiam mi pensas pri nia pliboniĝita vivo, mi havas pli grandan

energion por laboro. Ankaŭ mia edzino havas rideton ĉiam sur la vizaĝo. Ŝi ĉiam pretigis vespermanĝon, antaŭ ol mi revenis hejmen de la laboro. Ĉar mi ŝatas iom drinki por mildigi la laciĝon post laborado, ŝi ofte surtabligis botelon da vino. Kiam najbaro aŭ amiko alvenis, ni kune babilis drinkante. La legomoj konsumataj de mia familio estas produktitaj de mia parcelo de

privata uzo. Vintre ni havas spinacon, brasikon k.a., somere lufon, lenton k.a. Tutjare ni povas manĝi freŝajn legomojn, fiŝojn kaj viandon.

Vespere mi ofte rigardas televidon. Kvankam la televidaj programeroj ne estas tiel variaj kaj ne kontentigas min, tamen mi ne volas forlasi ĝin. Ĝi jam fariĝis spirita kunulo de nia familio.



Simplokarpo

En Longtan de Yoyang-floras. En Longtan de Yoyang-gubernio, Sichuan-provinco, troviĝas 21-jara simplokarpo. En marto 1981 ĝiaj folioj subite velkis kaj el ĝia radikilo elkreskis tigo alta je unu metro, kiu portas sur sia pinto grandan florburĝonon. En la lasa tagdeko de marto disvolviĝis la unua tavolo de la floro kun kvin ortlavaj petaloj en formo de lotusfloro. Samtempe elkreskis el la radikilo nova ŝoso kaj novaj folioj, kiuj kun la floro en la centro aspektas tre bele. La florburĝono daŭre disvolviĝis tavolon post tavolo kvazaŭ gravurita lotusoklo de budha staturita. En la lasa tagdeko de decembro la florpetaĵoj jam disvolviĝis en 24 tavoloj, kiuj elspiras mildan bonodoron.

Taŭdire tiu neordinara fenomeno rekte rilatas al nenormaleco de temperaturo, humideco kaj aliaj klimakondicoj de tiu loko.

Longe nevelkanta floro

Botanikistoj asertas, ke la arbo estas de hermatrodita altprodukta speco. Per gretitado de ĝiaj branĉoj oni elkulturis novajn aleurtiĵojn, kiuj konservas la bonajn kvalitojn de la patrino arbo.

ton, kiu natufoje donas fruktojn ĉiujare. Ĝi havas altecon de 13.1 metroj kaj trunkan perimetron de 1.3 metroj. Ĝiaj branĉoj klare dividiĝas en 11 tavolojn. Sur ĉiu branĉo kreskas 40%-e ĝiaj folioj, 40%-e viraj folioj kaj 20%-e folioj en ĉevalhuta formo. Ĉiujare ĝi donas pli ol cent kilogramojn da fruktoj, je 50% pli multe ol la ordinara aleurtio.

Simplokarpo (*Symplocarpus foetidus*) estas planto, kiu malofte



Rododendro-reĝo

Antaŭ nelonge laborantoj de la Botanika Instituto de Kunming sub la Ĉina Akademio de Sciencoj unufoje trovis grandan rododendron sur Gaoligong-monto, Yunnan-provinco, kiu nun nomiĝas rododendro-reĝo.

En la mondo troviĝas pli ol 800 specoj de rododendroj, kaj la trovita arbo apartenas al la plej altkreska speco. Ĝi havas altecon de pli ol 20 metroj kaj trunkan perimetron de ĉirkaŭ 2 metroj. Ĝiaj rozkoloraj floroj kun umbelaj infloreskoj estas tre multaj kaj belaj.


Ĉinio estas la origina kreskejo de rododendroj kaj havas pli ol 650 specojn, inter kiuj 420 troviĝas en Yunnan-provinco. Iuj specoj altas je 10-20 metroj dum aliaj nur je pli ol 20 centimetroj.

Cefalotakso

La esplora tacomto de la Herodoga Kompanio de Tongjiang-gubernio, Sichuan-provinco, trovis en montaro de sia gubernio multajn cefalotaksojn (*Cephalotaxus sinensis*), kies semoj kaj folioj estas materialoj por prepari medikamentojn kontraŭ kancero. Nun multaj landoj montris ardan entuziasmon pri serĉado de cefalotaksoj kaj ĉi ne domagis grandan monsumon por aketi ĝin pro la rareco.

Aleurtio 9-foje donanta fruktojn en unu jaro

En Leping-gubernio de Jiangxi-provinco oni trovis sovaĝan aleurtio-



BA HONG:

Leviĝo kaj falo de la Okcidenta Zhou-dinastio

Ilustritaj de REN MENGXIONG

LA reĝo Wu de Zhou-regno pereigis Shang-dinastion, fondis sian dinastion Zhou kaj prenis Gaojing (la nuna Xi'an en Shaanxi-provinco) kiel la ĉefurbon. En la historio oni nomis ĝin Okcidenta Zhou-dinastio.

FEŬDISMO KAJ LA KULTURA SISTEMO DE NAŬKVADRATOJ*

Por fortikigi sian regadon Zhou-dinastio aplikis politikajn kaj ekonomiajn aranĝojn.

Ĝi feŭdis al la samfamiliaj nobeloj de Zhou-dinastio la diversajn partojn de la lando, por ke ili fondu vasalajn regnojn de Zhou-dinastio. Inter 71 tiaj regnoj 55 estis regataj de samfamiliaj nobeloj kaj la ceteraj — de malsamfamiliaj nobeloj.

Samtempe kun tio, Zhou-dinastio fondis socian hierarkion, kiu rigore fiksis la personan lokon de la reĝo, feŭdulo, patro kaj filo, rigore distingis la rilatojn inter nobeloj kaj plebanoj, superuloj kaj subuloj, intimoj kaj neintimoj. La hierarkio difinis la politikan rilaton inter la reĝo kaj feŭduloj, feŭdulo kaj altaj oficistoj, kaj plifortigis la regadon de la reĝo super la feŭduloj kaj aliaj nobeloj. Krome, Zhou-dinastio pu-

blikigis rigoran kriminalan leĝon, laŭ kiu sklavomastro povis laŭplaĉe puni aŭ buĉi, aĉeti aŭ vendi sklavojn. Tiam oni per unu ĉevalo kaj fasko da silko povis aĉeti kvin sklavojn.

La kultura sistemo de naŭkvadratoj estis ankaŭ terposeda sistemo de Zhou-dinastio. Por kalkuli la grandecon de la feŭditaj bienoj kaj la rikoltan kvanton, precipe por kontroli la sklavojn laborantajn en la bienoj, la sklavomastroj dividis la teron en naŭkvadratajn kampojn. Laŭ la sistemo la sklavomastroj devigis milojn kaj dek-milojn da sklavoj kulturi kolektive kaj praktikis al ili ekstreme barbarajn sklavigon kaj ekspluaton.

Tiuj sklavoj antaŭe estis aŭ popolanoj kaj sklavoj de Shang-dinastio, aŭ kaptitoj de Zhou-dinastio en milito kontraŭ aliaj regnoj, aŭ krimuloj.

MORTO DE LA REĜO ZHAO

Post kiam Zhou-dinastio ekpraktikis feŭdismon kaj rigoran patriarkan hierarkion, la socia ekonomio disvolviĝis dum la pli ol 180 jaroj en la antaŭa periodo de la Okcidenta Zhou-dinastio. La reĝo Zhao plurfoje militis kontraŭ sudaj regnoj kaj gajnis grandan venkon. Sed

poste, ankaŭ li perdis amon de la popolo.

La reĝo Zhao plej ŝatis kuriozajn florojn kaj herbojn, birdojn kaj bestojn. Por ĉasado li eĉ prokrastis la ŝtatajn aferojn.

Foje iu kortegano diris al li: “Antaŭe malgranda suda regno tributis al nia kortego belan blankan fazanon, kies viando estas tre bongusta. Ĝi estas la plej bona birdo en la mondo. Sed Chu-regno en la sudo regas la regionon kaj eĉ ne respektas vian reĝan moŝton. Nur pro ĝia malhelpo la malgranda suda regno ne plu povas veni al Gaojing por tributi.” Tio aŭdinte, la reĝo Zhao tre koleriĝis kaj tuj decidis persone gvidi militistaron por iri puni Chu-regnon.

La armeoj de la reĝo Zhao dum la militado kaŭzis al la popolo grandan suferon. Viroj estis devigitaj servuti kaj virinoj lavi kaj kuiri por la militistoj. La trupoj survoje prirabis popolanojn senĉese.

Transpasinte la riveron Han-shui, la trupoj de la reĝo atakis la ĉefurbon Danyang de Chu-regno (la nuna Zhijiang-gubernio en Hubei-provinco) sed malsukcesis. Ne trovinte alian rimedon, li devis revenigi la armeojn.

Informiĝinte, ke la reĝo Zhao foriros, la popolanoj ĉe la rivero Hanshui elpensis artifikon kontraŭ li. Ili elektis kelkajn ŝipegojn, unue difektis ilin per hakitaj kaj poste gluis la difektitajn partojn.

Kiam la armeoj de la reĝo Zhao venis al la bordo de la rivero, ili konkure enŝipiĝis kun la rabbitaj ĉaroj, ĉevaloj kaj riĉaĵoj. Kiam la ŝipoj veturis en la rivermezon, la gluitaj difektajoj fendiĝis, kaj dispartiĝis la ŝipoj. La reĝo kaj liaj armeoj ĉiuj falis en la riveron, kaj la reĝo Zhao dronis.

OKCIDENTA VOJAĜO DE LA REĜO MU

Post la morto de la reĝo Zhao, lia filo Mu surtroniĝis. Li ŝatis vojaĝi. Rakontoj pri li abundas en antikva literaturo. En la jaro 281 p. K. oni trovis en antikva tombo de Jixian-gubernio, Henan-provinco, bambupecojn kun skribaĵoj, inter kiuj estis la rakonto "Biografio de la Reĝido Mu" plena de romantika koloro.

Pro tio la reĝo Mu estis honorita kiel la plej frua vojaĝisto en Ĉinio. La rakonto diras:

La reĝo Mu de Zhou-dinastio volis vojaĝi tra la tuta lando. Li do ordonis, ke Zaofu veturigu ĉaron tiratan de ok bonaj ĉevaloj de la nordo okcidenten. Li vizitis la hejmlokon de la akvodio, atingis la montaron Kunlun kaj rigardis la palacojn siatempe loĝatajn de Huangdi. Fine li venis al la okcidenta diino Xiwangmu kaj ĉeestis ŝian bankendon donitan por li. Li vojaĝis sume 17,500 kilometrojn. Li atingis Internan Mongolion en la nordo kaj Mez-Azion en la okcidento. Ĉie, kien li iris, li starigis bonan rilaton kun la lokaj nacioj kaj ŝtatoj, kaj reciprokis donacojn.

RIBELO DE POPOLANOJ

La jaro 841 a. K. estis komenciĝo de fidinda kroniko en la ĉina historio. En tiu jaro okazis epokfara evento: popolanoj en la ĉefurbo Gaojing ribelis kaj forpelis la reĝon Li. Tio fariĝis

turnopunkto de la dekadenco de la Okcidenta Zhou-dinastio.

La reĝo Li estis tirano. Li monopoligis ĉiujn montojn kaj akvojn por ekspluati la popolon. Tio limigis la vivrimedojn de la popolanoj kaj vekis grandan indignon ĉe ili.

Li aplikis subpremajn rimedojn, sendis homojn por superrigardi la popolanojn kaj malpermesis al ili diskuti ŝtatajn aferojn. La malobservantoj estis senkapigitaj. Tiu terura rimedo efikis nur portempe. La popolanoj silentis ŝajne, sed pligrandiĝis ilia malamo en la koro. Tamen la reĝo Li diris fiere: "Mia rimedo eliminis kalumnion!"

La reĝo ne atendis, ke erupciis la silenta vulkano. Unuiĝinte kun la popolanoj, ribelis la nobelaro kun Gong Baihe kiel la estro. La leviĝon partoprenis ankaŭ la metiistoj kaj gardistoj de la kortego. La reĝo Li fuĝis konsternite kaj kaŝis sin en Zhi (la nuna Huoxian-gubernio en Shanxi-provinco). Lia filo reĝi-



La reĝo Mu de Zhou-dinastio vojaĝas okcidenten por viziti la okcidentan diinon Xiwangmu.

do Jing sin kaŝis en la hejmo de kortegano Zhaogong. La ribelantoj rapide sieĝis la hejmon de Zhaogong kaj postulis ke li donu la reĝidon Jing. Trovinte neniun elirejon, Zhaogong donis sian filon anstataŭ la reĝidon Jing. Post la triumfo la ribelantoj elektis Gong Baihe kiel reganton de la ŝtato. De tiam skuiĝis la prestiĝo de la reĝo de Zhou-dinastio inter la feŭduloj.

PEREO DE LA OKCIDENTA ZHOU-DINASTIO

Post 14-jara regado de Gong Baihe, la reĝo Li mortis kaj surtroniĝis la reĝido Jing, kiu nomis sin la reĝo Xuan. Kvankam li estis diligenta en administrado de ŝtataj aferoj, tamen li neniel povis savi Zhou-dinastion el disfalo. Lia filo reĝo You estis la lasta reĝo de la Okcidenta Zhou-dinastio. Rakontante pri la pereo de la Okcidenta Zhou-dinastio en historiaj literaturaĵoj, oni priskribis senescepte pri dorlotado de la reĝo You al Baosi kaj alarmofajra trompo al feŭduloj.

Baosi, kromedzino de la reĝo You, estis tre bela, sed ŝi neniam ridis. La reĝo tre amis ŝin kaj ĉiamaniere klopodis por ke ŝi ridu, sed li ne sukcesis. Poste li elpensis rimedon trompi la feŭdulojn per bruligo de alarmofajroj por ridigi Baosi.

La alarmofajro estis milita alarmosignalo en la antikva Ĉinio. Ĉirkaŭ la ĉefurbo kaj sur la fortikaĵoj, kaj ĉe la vojoj kondukantaj al ili, oni starigis alarmofajrajn turojn, en kiuj tagnokte deĵoris soldatoj. Kiam malamikoj alvenis ataki, la gardistoj tuj alarmis per bruligo de fajro sur la turo nokte kaj per eligo de fumo tage.

La reĝo You ridigas Baosi per bruligo de alarmofajroj.



La reĝo deziregis ĝojigi Baosi kaj impertinente ordonis, ke oni bruligu la alarmofajrojn. Post mallonga tempo la alarmofajroj ekbrulis tra la tuta lando kaj ĉie leviĝis fumo, kion vidinte, la feŭduloj kaj generaloj opiniis, ke la ĉefurbo estas en danĝero, kaj tuj ordonis al siaj trupoj tagnokte rapidi al la ĉefurbo por protekti la reĝon. Sed atinginte la ĉefurbon, ili vidis nek militon, nek malamikojn. La feŭduloj kaj generaloj rigardis unu alian senvorte kaj devis reiri silente. Tion vidinte, Baosi sur la urboturo ekridegis nedeteneble. Ankaŭ la reĝo ricevis de tio grandan ĝojon.

Por ke Baosi fariĝu reĝino, la reĝo eksigis la reĝinon Shen kaj volis mortigi ties filon, la reĝidon Yijiu. La reĝido fuĝis al la regno Shen, sed la reĝo sendis


homojn persekuti lin ĝis Shen-regno. La estro de la regno Shen estis patrinflanka avo de Yijiu. Li neniel povis toleri la senskripulan fiagon de la reĝo You kaj atakis la ĉefurbon, aliancinte sin kun la okcidenta regno Quanrong. La reĝo You falis en danĝeron kaj bruligis alarmofajron por peti helpon. Sed tiufoje neniu alvenis. La reĝo You estis mortigita sub la monto Lishan (apud Lintong-gubernio). Baosi estis forkaptita de militistoj el Quanrong. La Okcidenta Zhou-dinastio pereis post 257-jara regado de 12 reĝoj.

** Laŭ la sistemo oni dividis unu grandan parcelon en naŭ malgrandajn kvadratajn pecojn, la ok pecoj estis asignitaj al la sklavo, kiuj devas kolektive kulturi la centran pecon por la mastro.*

Ĉu vi interesigas pri Ĉinio?

Legu la libron eldonitan de El Popola Ĉinio

SKIZO PRI ĈINIO



Ĝi konigas al vi la ĝeneralan fizionomion de la lando inkluzive de ĝiaj geografio, historio, politiko, ekonomio kaj kulturo.

KUN MAPO KAJ ILUSTRAĴOJ

Numero: 17-Es-1054P

Formato: 132×186mm, 104 paĝoj, broŝ.

Prezo: £0,65 US\$1,30

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
peranto de EPC

aŭ: Esperanta Sekcio de Centro de
Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHU-
DIAN), P.O. Kesto 313, Beijing,
Ĉinio

 **Fonto**

kiu per sia unua jarkolekto (oktobro 1980 — septembro 1981) firme establiĝis kiel la **beletra revuo** de la okdekaj jaroj. **Redaktoro: William Auld.** Aperas ĉiumonate: 12 ilustritaj kajeroj, po 44p., jare.

Enhavo de la unua jarkolekto: 40 originalaj noveloj, 29 tradukitaj noveloj (el 9 lingvoj), 108 originalaj poemoj, 143 tradukitaj poemoj (el 25 lingvoj), 2 teatraĵetoj kaj 3 longaj recenzoj.

Abonojn por la 2a jarkolekto akceptas la Libroservo de UEA.

Prezo: 39,00 gld. (plus 4%, nur por nederlandaj klientoj).

Eldonisto:

Gersi Alfredo Bays

Caixa Postal 49

BR-89800 Chapeco (SC)

Brazilo

Dolĉa akvo vekanta preman zorgon al la mondo


de Wang Tao

DOLĈA akvo estas la fonto de la vivestajoj kaj necesajoj por produktado de industriaĵoj. Hodiaŭ aperis en la mondo pli kaj pil multe da landoj kaj regionoj, al kiuj terure mankas akvo kaj nehaveblas akvo por higiena vivo. La serioza manko de dolĉa akvo vekis ĝeneralan zorgon ĉe la registaroj kaj internaciaj institucioj tra la mondo.

Hodiaŭ, la regionoj, kie mankas dolĉa akvo, jam vastiĝis de la dezertoj de Mezoriento, por kiu “dolĉa akvo karas kiel oleo”, kaj la seka kaj varmega

Afriko al Eŭropo kaj Latinameriko. De la lastaj jaroj Hindio, Pakistano, Brazilo, Aŭstralio kaj Meksikio eksentis ĉiam pli seriozan mankon de akvo; Britio, Japanio, FR Germanio kaj la orienta Eŭropo komencis senti nesufiĉecon de akvo; kaj eĉ Sovetunio kaj Kanado, kiuj havas relative riĉan rezervon de dolĉa akvo, estas minacataj de akvomanko en iuj lokoj. Oni taksis, ke 60% de la regionoj de la tuta mondo suferas de nesufiĉeco de akvo kaj pli ol 40 landoj suferas teruran mankon de akvo.

Akvo el la Flava Rivero atingis la urbon Tianjin



Ankaŭ Ĉinio sentas pli kaj pli akran mankon de dolĉa akvo. Ekzemple en agrikulturo meznombre 30 milionoj da hektaroj da agroj de Ĉinio suferas sekecon en ĉiu jaro, kaj luktado kontraŭ trosekeco jam fariĝis konstanta tasko. Precipe en la lastaj du jaroj, norda Ĉinio suferis de trosekeco; Pekino, Tianjin kaj Hebei-provinco alfrontas ĉiam pli grandan nesufiĉecon de akvo kaj en iuj lokoj okazis katastrofa manko de akvo.

Kial en la mondo aperis serioza manko de akvo?

Unue, pro tio, ke senĉese kreskas la loĝantaro de la mondo kaj altiĝas la vivnivelo de la homaro, sekve de kio rapide grandiĝas la akvobezono. Dum la pasinta duona jarcento, la konsumkvanto de dolĉa akvo en pli ol duono de la mondo duobligis pro kresko de la loĝantaro. Laŭ statistiko pri Usono, la meznombra kvanto de akvo ĉiutage bezonata de unu persono estis 1,500 galjonoj en 1960, 1,800 galjonoj en 1970 kaj 1,900 galjonoj en 1980. Depost la kvindekaj jaroj, la loĝantaro de Ĉinio preskaŭ duobligis, do la kvanto de konsumita akvo almenaŭ duobligus, eĉ se la akva kvanto konsumita de ĉiu persono ne kreskus.

Due, pro la disvolviĝo de agrikulturo kaj moderna industrio, multe pligrandiĝis la bezonata kvanto de akvo. En agrikulturo oni plivastigis la areon de irigaciataj kampoj, lavadis per akvo alkalajn parcelojn por ilin plibonigi kaj klopodis reformi dezertojn, kio ĉio bezonas grandan kvanton da akvo. La areo de irigaciataj kampoj de Usono triobligis en la pasintaj tridek jaroj, kaj la kvanto de

konsumata akvo en agrikulturo konsistigas pli ol 80 procentojn de tiu konsumata de la tuta lando. Kreskis ankaŭ la kvanto de konsumata dolĉa akvo en modernaj industrioj. Oni konstatis per kalkulo, ke oni bezonas 150 litrojn da akvo por produkti 1 kg. da ŝtalo, 700 litrojn da akvo por 1 kg. da papero, 2,000 litrojn da akvo por 1 kg. da sinteza kaŭĉuko kaj 400,000 litrojn da akvo por fabriki unu aŭton.


Trie, pro tio, ke akvofontoj estas grave poluciitaj. La granda rivero Rejno, kiu trafluas la eŭropan regionon plej dense loĝatan, estas serioze poluciita per malpura akvo kaj rubo el industriaĵoj kaj multego da urboj. Laŭ enketo farita de Usono, serioze poluciitaj estas la akvoj en multaj regionoj de Usono kaj nur malpli ol duono de ĝiaj 3,700 relative grandaj urboj atingis la postulatan normon en repurigo de sia uzita akvo. Ankaŭ la ĉefaj ĉinaj riveroj kaj lagoj estas diversgrade poluciitaj pro uzado de kemiaj sterkoj kaj insekticidoj en agrikulturo kaj verŝado de malpura akvo kaj rubo en ilin.

Plej maltrankviliga estas tio, ke nuliĝis multaj utiligeblaj dolĉakvaj rezervoĵoj pro poluciado de la medio, kaj la homaro vizaĝas pli kaj pli mizeran provizon de trinkakvo. Oni eĉ devas trinki akvon malutilan al la homa sano. Pro senĉesa poluciado de la riveroj per malpura akvo el industrio kaj manko de efika rimedo kontraŭ tio, 80 procentoj de la loĝantoj en multaj landoj de la tria mondo devas trinki malpuran akvon. Laŭ informo de la Monda Higiena Organizaĵo,

400 milionoj da homoj suferas de intesta kaj stomaka kataro, kaj tridek milionoj da homoj suferas noktan blindecon pro trinkado de malpura akvo, kaj 50 procentoj de la 18 milionoj da infanoj mortintaj ĉiujare rilatas al la sama kaŭzo. La poluciado de akvo kaŭzas ne nur morton de dekmiloj da homoj en ĉiu tago, sed ankaŭ damaĝon al multaj akvaj plantoj kaj bestoj.

Krom la kresko de la konsumata akvokvanto kaj la malpurigo de akvofontoj, ankaŭ negaleco de la dislokiĝo de akvofontoj en la mondo estas kaŭzo de la ĝenerala manko de dolĉa akvo. En iuj partoj de la mondo la akvovaporiĝo estas malpli multa ol la precipitaĵo, sekve formiĝis multaj riveroj kaj lagoj; en aliaj regionoj neniom pluvas tutjare kaj formiĝis vastaj dezertoj; en triaj regionoj plagas inundoj pro koncentriĝa pluvado. En suda Ĉinio, ekzemple, estas malmulte da agroj, sed multe pluvas; en norda Ĉinio estas multe da agroj, sed malmulte pluvas. Tiu malegaleco de dislokiĝo de akvo kaj agro alportis grandan malfacilon en akvoprovizo al industrio kaj agrikulturo en norda Ĉinio.

Kaj krome oni devas kompreni, ke la rezervata dolĉa akvo ne estas neelĉerpebla. 97.5% de la akvo sur la tero estas marakvo, dum nur 2.5% estas dolĉa; kaj 70% el la dolĉa akvo ekzistas en formo de glacio. La vere utiligebla kvanto de akvo en riveroj konsistigas nur 0.0001% de la totala kvanto de la tutmonda akvo. La dolĉa akvo en formo de glacio troviĝas duone en Sovetunio kaj Kanado, kaj plejparto de la alia duono en la Antarkta Oceano. Tre malmulta estas la vere utiligebla dolĉa



Kanalo fosita por konduki akvon el la Flava Rivero en Shandong-provincio

akvo por la homoj kaj tio estas unu el la plej gravaj kaŭzoj de la nesufiĉeco de dolĉa akvo en multaj regionoj de la mondo.

Por venki la gravan malsufiĉon de dolĉa akvo en la mondo, diverslandaj sciencistoj komencis la aktivadon de "Internacia Hidrologia Jardeko" frue en la jaro 1965, kaj okazis pluraj internaciaj konferencoj pri la akvorezervo. Je la fino de 1980, UNO difinis la periodon de 1981 ĝis 1990 kiel "Internacian Jardekon de Trinkakvo kaj Higieno" kaj alvokis al ĉiuj landoj, ke ili aktive klopodu por ŝpari akvon, batalu kontraŭ polucio de akvofontoj kaj serĉu novajn akvofontojn, por ke ĉiu loĝanto havu sufiĉe da higiena trinkakvo kaj la modernaj agrikulturo kaj industrio dece disvolviĝu en la okdekaj jaroj.

La serioza manko de dolĉa akvo devigas nun multajn landojn alpreni rimedojn por sin helpi. En batalo kontraŭ polucio al la rivero Tamizo, Britio atingis grandan sukceson. Antaŭ 25 jaroj Tamizo estis rigardata kiel "morta rivero", sed nun ĝi jam reviviĝis dank' al grandaj klopodoj kontraŭ polucio, kaj pli ol cent specioj de fiŝoj renaĝas en ĝi. En la lastaj jaroj, certaj landoj esploradis por trovi teknologiojn por senpoluciaj tinkturado, hardado kaj produktado de kemiaĵoj, papero kaj ŝtalo, kaj iuj novaj teknologioj estis jam aplikataj. Ekzemple, en Kanado kaj Usono oni jam sukcese starigis fermitan akvocirkulan sistemon por industrio. Iu paperfabrika

kompanio de Kanado jam fondis la unuan paperpulpan fabrikan senpolucian en la mondo, kies produktaj procedoj plenumiĝas en fermita sistemo kun cirkulantaj akvo kaj kemiaĵoj.

Koncerne al serĉo de novaj akvofontoj, iuj landoj konstruis kanalojn aŭ fosis putojn, dum aliaj landoj kuraĝe proponis akiri dolĉan akvon de la sudpolusaj glaĉeroj. La plej vaste aplikata kaj ankaŭ la plej disolvebla rimedo por akiro de dolĉa akvo estas sensaligado de marakvo. En 1980 en Kuvajto jam aperis tri akvo-sensaligejoj kaj la kvara estas konstruata. Tiuj kvar fabrikoj povos sensaligi ĉiutage 102 milionojn da galjonoj da akvo kaj fundamente

solvi la problemon de manko de dolĉakvo. Kvankam la marakvo estas abundega, tamen por ĝin sensaligi oni devas pagi tro multe da mono, tial la sensaliga industrio renkontas striktan limigon.

Tianjin, la plej granda industria urbo en norda Ĉinio, suferis de akra nesufiĉeco de dolĉa akvo por industrio kaj vivbezono de la loĝantoj dum la lastaj jaroj. Por solvi tiun problemon, oni fosis du kanalojn por konduki akvon el la Flava Rivero al tiu urbo. La kanaloj jam estis finkonstruitaj en decembro 1981 kaj nun ludas gravan rolon en solvo de la problemo per la akvo alkondukita de lokoj centojn da kilometroj malproksime.



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 interna respondekupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPC povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

La Red.

* Zbigniew Wachowica (21-jara studento) ŝatas korespondi kun geamikoj el aliaj landoj pri ĉiu temo. Adreso: ul. J. Krasickiego 6, 33-100 Tarnow, Pollando aŭ: 33-127 Czerwna 398, Woj. Tarnow.

* Świerczynski Zbigniew, 42-200 Czestochowa, ul. 16 Stycznia 73/40, Pollando, dez, kor.

* Tri grupetoj de gejunuloj, esperantistaj komencantoj, el pedagogia gimnazio kaj el mezekonomia lernejo en Celje (15 ĝis 18 jaraĵ) deziras korespondi precipe kun ĉinaj gejunuloj. Skribu al: Franc Kleĉ, 63000 Celie, Partizanska 12, Jugoslavio.

* Gelernantoj biokemiaj (ĉ 18-j.) deziras korespondi kun alilandaj gelernantoj, S-ro Wallez Gilles, BP. 2299 Abidjan 08, Côte D'Ivoire, Ebura Bordo.

* Mi deziras korespondi kun ĉinoj kiuj interesiĝas ĉefe pri Esperanto, Herman Deceuninck, Floralaan 21, B-1510 Buizingen, Belgio-Eŭropo.

* S-ro Torvid Edvardsen, ul. Sopotcka 2m.", 71-475 Szczecin, Pollando, Norvego, emerita ŝipradiotelegrafisto, dez. kor. kun samideanoj el Usono, Japanio kaj aliaj foraj landoj, ankaŭ anglalingve,

pri div. temoj, precipe vegetarismo, naturkuracado.

* Mi estas 43-j. ekonomiistino invalida. Mia hobia estas metio, Halina Wolozyk, 26 Marca 27/31, 44-300 Wodzislaw, Pollando.

* Luis Vicino, Str. Castro Barros Nr. 1433, Poŝta kodo 1237, Buenos Aires-36-Argentina Respubliko, kolektas kartojn.

* S-ino Scherer Camille, 360 cours emile Zola F 69100 Villeurbanne, franca emerita instruistino deziras korespondi en Esperanto kun ĉina samideano preferinde filatelema. Ŝi certe respondos al ĉiu korespondanto.

* Elmo Renevel Ferraz, Rua Andrade Neves, 60, CEP 90000 Porto Alegre-Rio G. do Sul, Brazilo, dez. kor. kun ĉinoj, kiuj volas korespondi kun brazilano.

* Bencze Rora, 60-j. pens-instruistino, dez. kor. kun esp-oj pri ĉiutaga vivo, literaturo kaj diversaj temoj. Adr. Str. Cura V. nr. 93, 4300 Jhgu-Mures, Jud. Mures, R.S. Rumanio.

NOVA ATINGO EN ESPLO- RADO PRI BAZA MATERI- ALO DE LA VIVO

En la fino de la pasinta jaro, post penado en 13 jaroj, la Ŝanhaja Biokemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj institucioj sukcesis arte sintezi ribonukleatan acidon el fermentila alanino. Tio estas alia grava sukceso post la arta sintezo de bova insulinino farita de Ĉinio.

Nukleata acido estas grand-molekula kaj ekzistas en la korpo de ĉiuj animaloj. Ĝia ĉefa rolo estas decidi la heredecan de la animaloj, gvidi kaj konsistigi la sintezon de proteino en animala korpo. Ribonukleata acido transformita el fermentila alanino estas unu el ĝiaj specoj. La esplorado pri la baza materialo de la vivo celas koni la rilatojn inter la strukturo kaj funkcio de arta nukleata acido kaj ties rolon en la korpo de animaloj kaj utiligi tiun rolon por la bono de la homaro.

SUKCESA EKSPERIMENTA FLUGO DE ĈINA ELEKTRA RAKETO

Lastatempe sukcesis la eksperimenta flugo de ĉina elektra raketo. Telemezurado pruvis, ke la du motoroj funkcias bonorde, kaj la eksperimenta flugo atingis la deziratan celon. Ekde tiam Ĉinio havas novan kosmoraketan motoron por longa uzado kaj kun malgranda pelforto kaj granda rapideco. Facile manipulebla, ĝi taŭgas por pozici-teniĝo kaj orbito-revizado de satelito aŭ spacveturilo.

ĈINIO VASTE UTILIGAS LA ATOMTEKNIKON

Ĉinio vaste utiligas izotopojn, radiadan kaj aliajn nukleajn teknikojn en agrikulturo, industrio, higieno kaj scienco.

Ĉinio jam elkulturis 150 novajn plantospeciojn per la metodo de radiado. La totala areo de kampoj, kie oni kreskigas la novajn speciojn de greno, oleplantaĵo, koton, kanabo, fruktoj, legomoj k.s. jam superis 6 milionojn da hektaroj. La sola produktokvanto de greno multigis je 2.5 milionoj da tunoj. La esplorado pri uzo de radio en konservado de porkviando, fruktoj, fiŝoj, legomoj, kaŝtanoj, fungoj, ledo k.a. akiris ĝojigajn sukcesojn.

Esepte de Tibeto, ĉiuj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj aplikas la nuklean teknikon en medicino, precipe por diagnozi kaj kuraci kanceron, por balaa ekzameno de internaj organoj, en kuracado de tiroidaj malsanoj, en naskolimigo, eŭgeniko, medikamenta elektado kaj esplorado de fundamenta medicino.

LA DEK PLEJ BONAJ GESPOR- TISTOJ DE ĈINIO EN 1981

Dek ok ĵurnalismaj institucioj de Pekino kune iniciatis balotadon por elekti dek plej bonajn sportistojn de 1981. Elektitaj per entute 252,721 balotiloj estas Sun Jinfang (flugpilkistino), Lang Ping (flugpilkistino), Chen Xiaoxia (plonĝistino), Guo Yuehua (tablotenisisto), Rong Zhihang (piedpilkisto), Li Yuejiu (gimnasto), Zou Zhenxian (trialsaltisto), Tong Ling (tablotenisistino), Wu Shude (halterlevisto) kaj Li Xiaoping (gimnasto).

MULTE KRESKIS LA ŜPARMO- NO DE LA ĈINA KAMPARO

Statistiko en la fino de 1981 diris, ke la mono en la ŝparkasoj de la agrikulturaj bankoj kaj la kreditaj kooperativoj de Ĉinio superis 21,169 milionojn da juanoj, nome 41.9 procentojn pli multe ol tiu de 1980. Interalie, la persona ŝparmono estis 16,947 milionoj da juanoj.

La kresko de ŝparmono de la kamparanoj rezultis ĉefe el tio, ke multe disvolviĝis la ter-kaj arbarkulturado,

brutobredado, fiŝbredado, industrio kaj aliaj neagrikulturaj okupoj en la kamparo, sekve la kamparanoj ricevis de sia kolektivo pli da greno kaj mono.

ĈINIO RAPIDIGAS LA KON- STRUADON DE POREKSPOR- TAJ ŜIPOJ

Ĉinio komencis konstrui poreksportajn ŝipojn kun totala kapacito de tricent mil toneloj.

La konstruado estis interkonsentita de la Ĉina Ŝip-industria Kompanio kaj eksterlandaj komercistoj. En la pasintaj du jaroj Ĉinio konsentis eksporti ŝipojn kun totala kapacito de sescent mil toneloj. Ĉi-jare Ĉinio konstruos kargoŝipojn de 36,000 kaj 27,000 toneloj, kontenerŝipojn de 11,000 toneloj kaj kvar surmarajn platformoj.

La unuaj poreksportaj ŝipoj jam estas lanĉitaj. La 27,000-tonela ŝipo "Changcheng" por lozaj varoj estis konstruita de Dalian-ŝipfabriko por la Ŝip-kompanio Liancheng de Hongkong, kaj la alia kargoŝipo "Haijian" de 17,500 toneloj estis konstruita de Zhonghua-ŝipfabriko de Ŝanhajo.

PLEJ POTENCA TELEVIDILA ĈENPRODUKTA LINIO DE ĈINIO EN ŜANHAJO

La Unua Ŝanhaja Televidila Fabriko instalas en si ĉenproduktan linion povantan produkti ĉiujare ducent mil 14-colajn kolorajn televidilojn. En la komenco de la nuna jaro la linio komencis provan produktadon. Ĝi estas la plej potenca ĉenprodukta linio de koloraj televidiloj en Ĉinio.

La linio, aĉetita el Japanio, konsistas el 1,800 diversaj partoj, inkluzive aŭtomatajn, peco-enmetajn maŝinojn, lutilojn, pakmaŝinojn, detektilojn k.a. Interalie duono de la aparatoj, ekzemple la akvosistemo, cirkvitaro kaj klimatiziloj, estas farita de Ĉinio.



VOJAĜO AL NORDA SHANXI-PROVINCO

de CAO BAILONG

LA norda Shanxi-provinco estas loko kun longa historio kaj fama kulturo. Tie troviĝas Wutai-monto, unu el la kvar famaj budhismaj lokoj de Ĉinio*, staras Hengshan-monto, unu el la kvin famaj montoj de Ĉinio** kaj troviĝas ankaŭ la Ŝtonkavernaro Yungang, egale fama kiel la ŝtonkavernaroj Dunhuang kaj Longmen. La tiea antikva arkitekturo ĝuas plej altan reputacion tra la lando. La Ligna Pagodo de Yingxian-gubernio konstruita en 1056 p.K. estas la plej antikva kaj plej alta pagodo kun ligna strukturo en nia lando. Pro ĉio ĉi la tieaj historiaj lokoj ĉiam allogas al si milojn kaj dekmilojn da turistoj en kaj eksterlandaj. Antaŭ nelonge mi ĝojplene vizitis la lokon kaj mia unua celo estis Wutai-monto.

WUTAI-MONTO — SANKTA LOKO POR BUDHISMO

Wutai-monto, pri kiu cirkulas multe da budhismaj legendoj kaj belaj mitoj, estas loko, pilgrimata de la budhanoj de Ĉinio kaj aliaj landoj de Azio, ĉar ĝi estas la sola fea monto menciita en sutro. En la unua jarcento p.K., kiam la budhismo atingis Ĉinion, tie jam aperis temploj. Legendo diras, ke Manjusri***, fama bodisatvo, tie predikis. Kaj ekde tiam la monto fariĝis unu el la sanktaj lokoj por la ĉinaj budhanoj. En la pasinteco multaj imperiestroj konstruigis tie templojn, el kiuj ĝisvivis hodiaŭ 76 temploj kaj pli ol 24,000 budhaj statuoj.

Wutai-monto, kvankam nomata "Nordĉinia Tegmento" kun ĉefa montpinto alta je pli ol 3,000 metroj

super la marnivelo, tamen plejparte havas milde levigantajn deklivojn kaj sekve estas facila por grimpi. La nomo de la monto devenis de tio, ke ĝiaj kvin montpintoj estas larĝaj kaj ebenaj, kvazaŭ terasoj. (Wutai en la ĉina lingvo signifas "kvin terasoj".) En la sino de tiuj kvin montpintoj troviĝas malgranda ebenaĵo nomata Taihuai, kie koncentriĝas plejparto de la temploj.

Enirinte la ebenaĵon Taihuai, oni unue vidis blankan pagodon 75 metrojn altan kun 83-metra cirkonferenco. Sur la pinto de la pagodo kuŝas bronza pleto kun diametro de ok metroj, sur kiu staras bronza botelo kvin metrojn alta. La pagodo estas ornamita per 252 bronzaĵoj, kiuj aŭdigas klaran sonon en facila vento. Ĉe la piedo de la pagodo troviĝas tri salonoj, en kiuj staras po unu bronza statuo de bodisatvo. Ĉiu-frumatene bonzoj en stoloj recitas sutron ĉirkaŭ la pagodo. Tio estas la fama templo Tayuan.

Norde de tie estas la templo Xiantong, kies antaŭo, unu el la plej fruaj budhismaj temploj, estis konstruita en la unua jarcento p.K., kiam budhismo atingis Ĉinion. En la templo troviĝas alta turo kun kvin-tuna kupra sonorilo ene, kies sono oreplaĉa aŭdiĝas tra la tuta montvalo. Antaŭe ĝi funkciis kiel horloĝo.

La templo estas vasta, impona kaj simetria, okupanta pli ol 20 hektarojn. Ĉiuj ĝiaj pli ol 400 ĉambroj, escepte de Wulian-halo, estas konstruitaj el ligno. Wulian-halo, konstruita per brikoj, estas pli ol 20 metrojn alta, 28 metrojn longa kaj 16 metrojn larĝa. En la halo troviĝas

neniu trabo kaj kolono. Ĝi estas kremo de la antikva brik-struktura arkitekturo de Ĉinio en la 13-a jarcento p.K. Interne de ĝi troviĝas bildo de sep-etaĝa pagodo kun pavilonoj, budhaj figuroj, lotusoj kaj tintiloj, formita el 600,043 ideografiaj de Avatamsaka sutro. Ĝi estas majstroverko de la budhisma arto.

Forlasinte la halon, mi supreniris laŭ la ŝtuparo kaj atingis la Bronzan Kioskon kvadratan, tri metrojn altan, ĝiaj kvar muroj konsistas el multaj munteblaj bronzaĵoj, interne de kiuj estas dekmiloj da malgrandaj budhaj statuoj kaj ekstere de kiuj estas 36 delikataj bildoj, ekz. du drakoj ludas kun globo, karpoo transsaltas drako-pordon, fenikso omaĝas al la suno, kaj aliaj interesaj bildoj.

Ambaŭflanke de la Bronza Kiosko staras po unu 13-etaĝa bronza pagodo plena de mulditaj budhaj statuoj kaj diversspecaj desegnoj. Ĉe ĉiu angulo de la kvadrataj sokloj staras po unu atleta statuo subtenanta la pagodojn per manoj aŭ kapo.

Malantaŭ la templo situas la alta impona templo Pusading, tegmentita per flavaj glazuritaj tegoloj, kiu tre similas al imperiestra palaco. Por atingi la templon oni devas trapasi 108 ŝtupojn, ĉar laŭ legendo estas 108 ĉagrenoj por homoj. Se oni trapasis ĉiujn tiujn ŝtupojn, oni do elturniĝis el ĉiuj ĉagrenoj. Sur la plej alta ŝtupo staras grandioza portalo kvar-kolona kaj tri-porda, sur kies centra supro estas kvar ideografiaj signifantaj "pitoreskejo sur la dia kulmino", skribitaj de la imperiestro Kangxi (1662—1722 p.K.) de

Qing-dinastio. Kiam turistoj mal-suprenrigardas de tie, blanka nebulo ŝvebanta super la klara rivero kaŭzas al ili iluzion, kvazaŭ ili sin trovus en la paradizo.

ŜTONKAVERNARO YUNGANG

Norde de Wutai-monto je distanco de malpli ol duonhora veturado situas la antikva urbo Datong. Sur la monteta, gruza vojo apenaŭ troveblas arboj. Veturante per aŭto, oni vidas la monton Wuzhou en malproksimo, kie kuŝas multe da grandaj kaj malgrandaj budhaj statuoj. Tie laŭ la monta deklivo estas ĉirkaŭ 1,100 ŝtonkavernoj, kiuj etendiĝas unu kilometron. Ili dividas sin en 21 grupojn, kie troviĝas 51.000 statuoj. La impona konstruaĵaro ekzistis jam pli ol 1,500 jarojn.

La ŝtonkavernaro similas al arta domo. En ĝia fama kvina kaverno majeste sidas budha statuo 17 metrojn alta, la plej granda statuo en la ŝtonkavernaro. Por atingi ĝian verton oni devas grimpi tri etaĝojn. Estas vojo kondukanta el la kvina kaverno al la sesa, kie ĉie estas skulptitaj bildoj pri la vivo de Ŝakjamunio, la kreinto de budhismo, de lia naskiĝo al budhiĝo. En la 20-a kaverno estas budha statuo 13.75



La statuo de Ŝakjamunio en la 20-a kaverno en Yungang

metrojn alta, kiu estas la plej alta inter la tieaj subĉielaj statuoj. La budha statuo kun trankvila mieno, vestita okulplaĉe, estas elvokiva.

Kial do aperis tiaj ŝtonkavernoj en la gruza kaj monteta regiono en la nordo de Shanxi-provinco? La kialoj estas jenaj: En 446 p.K. la imperiestro Taiwu de la Norda Weidinstio akceptis proponon de iu


kortegano pereigi budhismon, bruligis ĉiujn budhismajn templojn kaj devigis la bonzojn laikiĝi. Sed poste la imperiestro malsaniĝis kaj eksuspektis, ke li fariĝis kulpa antaŭ la budho, kaj li ekpentis. Fine li mortigis la proponfarintan korteganon. Lia nepo post sia surtroniĝo antaŭ ĉio restarigis budhismon, konstruigis budhaj templojn en granda skalo kaj ordonis al fama bonzo respondeci pri konstruo de la ŝtonkavernaro. La konstruado daŭris 40 jarojn.

Temploj sur rokmuro de Hengshan-monto



MIRINDA TEMPLO XUANKONG KAJ LIGNA PAGODO DE YING-XIAN-GUBERNIO

Veturinte tri horojn per aŭto mi atingis Hengshan-monton. La montakrutajo rekte kontraŭ Hengshan-monto estas inkrustita per ruĝaj konstruaĵoj. Rigardate de malproksime, ĝi tre similas al rubeno sur la monttalo. La tieaj loĝantoj tiel priskribas la templon: "La templo Xuankong estas en la aero kvazaŭ pendigata de tri ĉevalaj vostharoj." La konstruaĵoj sin apogas sur la alta kruta rokmuro kaj rigardas al profunda valo. Ili, groteskaj en strukturo, baziĝas sur rokmuro. La pli ol 30 konstruaĵoj ĉiuj estas



La Ligna Pagodo en Yingxian-gubernio

diametro de 30 metroj, estas la plej antikva ligna pagodo en Ĉinio. Ĝi estas korpe okflanka, kvin-etaĝa kaj konstruita el 3,500 kubmetroj da ligno peza je ĉ. 3,000 tunoj. Lignaj ŝtupetaroj ligas ĉiujn ĝiajn etaĝojn. Ĉe la balustradoj turistoj povas feren birdrigardi. Elteninte kelkajn tertremojn, la pagodo restis nedamaĝita, kaj tio mem ja pruvas ĝin majstroverko de la ĉina arkitekturo.

Jam falis vespera krepusko, kiam mi revenis de Yingxian-gubernio al Datong. Vojaĝinte la tutan tagon, mi tamen ankoraŭ havas grandan intereson, ĉar tie ankoraŭ multe da vidindaj lokoj atendas min.

* La kvar famaj budhismaj lokoj estas Wutai-monto en Shanxi-provinco, Emei-monto en Sichuan-provinco, Jiuhua-monto en Anhui-provinco kaj Putuo-monto en Zhejiang-provinco.

** La kvin famaj montoj de Ĉinio estas Taishan-monto en Shandong-provinco, Huashan-monto en Shaanxi-provinco, Songshan-monto en Henan-provinco, Hengshan-monto en Shanxi-provinco kaj Hengshan-monto en Hunan-provinco.

*** Manjusri estas unu el la budhismaj bodisatvoj, servisto de Ŝakjamunio. Lia statuo ĉiam montras lin rajdanta sur leono.

lignaj. La konstruaĵoj elstaras en la aero kaj estas simetriaj. Inter ili troviĝas lignaj ŝtuparoj, konkukantaj de supre malsupren. La konstruaĵoj sentigas la turistojn, kvazaŭ ili pendus en la aero, fee ŝvebantaj. Ili estas kvazaŭ labirinto por vojaĝantoj, kiuj ja ne povas eliri sen vojqvidisto.

La templo konstruita en la 6-a


jarcento p.K. jam havas historion de 1,400 jaroj. Elteninte erozion kaj tertremojn dum multaj jaroj, ĝi tamen estas konservita komplete, kio mem ja estas mirindaĵo!

Sude de Hengshan-monto post unu-hora veturado, oni ja vidas la Lignan Pagodon de Yingxian-gubernio, konstruitan en 1056 p. K. La pagodo, 66 metrojn alta, kun baza

KARIKATURO


Ludi Levstangon

de ZHANG JIANMIN





La reliefo "Ĉiela Feino Disjetas Florojn" flanke de la pordo de Nanshan-templo




Stona portalo antaŭ la templo Longquan

Budhismaj artaĵoj en Wutai-monto

Fotoj de LI HUIPU

Manjuri sur leono en kupra pavilono en Xiantong-templo






Matenruĝo ĉe la Flava Rivero

Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero (1)

La antikva pramejo Fenglingdu



Fotoj de ZHOU QINJUN

La pramejo Dayudu ĉe la norda bordo de la Flava Rivero. Legendo diras, ke en Xia-dinastio (ĉ. 21-a — 16-a jarcento a.K.) la reĝo Dayu suden transiris la riveron je tiu ĉi loko por jungi la akvon, kaj pro tio la pramejo ricevis la nomon.



Kunfluejo de la Flava Rivero kaj ĝia plej granda branĉo Weihe-rivero ĉe Tongguan





Elektra pumpstacio ĉe la pramejo Dayudu povas levi akvon ĝis loko 194 metrojn alta por irigacii kampojn.



La pramejo Fenglingdu

Fervoja ponto super la Flava Rivero ĉe la pramejo Fenglingdu

